HUNGARA VIVO

5
1984
13,-Ft

Mebloj BUBIV kreas atmosferon

SERĈU NIAJN MARKOVENDEJOJN:

BUDAPEST III. EZÜSTHEGYI ÚT 2. 688-091
VII. RÓZSA F. U. 4-6. 224-016
VIII. BAROSS U. 75. 137-869
EGER, DOBÓ TÉR 8.
JÁSZBERÉNY, LAZOVI ÚT 2.
GYULA, FELSZABADITÓK ÚTJA 79.

bubiv

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf.193. H-1368
Aperas dumonate
XXIVa jaro, 1984 n-ro 5
(117)

ENHAVO

László, I.: Departemento Szolnok 162
Benczik, V.: Hungaroj ekster Hungario 164
József, A.: Urboranda nokto (*I. Szabó*) 166
Örkény, I.: Vertiĝo (*d-ro I. Nagy*) 167
Gergely, M.: Epitafo (*d-ro M. Fehér*) 169
Szabó, I.: Kiam 169
Giorgi, A. de: Kantu, por... 169
Unu poemo – en du tradukoj 170
Bálint, Sz.: La malfacila decido 171
Szenes, I.: Respondo el Britujo 173
Benczik, V.: Gvidlibro pri mondlingvaj problemoj 174
Thur, O.–*Gyerkó*, Gy.: Por kontraŭbatali katastrofan infektadon (*E. Fenyvesi*) 176
Panoramo 180
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 183
Csepel Rapal levatoroj por strataj veturiloj 184
Dudás, L.: Fabrikado de novtipaj termotransigiloj (*E.Fenyvesi*) 186
Recenzoj de *V.Benczik, E.Fenyvesi, Z.Heide, B.Kolker, Imre Szabó* 191
Zbigniew Dobrzynski mortis 197
Gaja paĝo 198
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 199
Leterkesto, Korespondi deziras 200

Sur la frontpaĝo foto de Z. *Fejér*

Libroj havas gravan...

rolon en la Esperanta kulturo: ili venkas la tutglobajn distancojn kaj povas atingi – almenaŭ principe – eĉ la plej izolitan esperantiston, eĉ en la plej fora angulo de la mondo. Kaj libroj triumfas ankaŭ super la tempo: per libroj ni ricevas la mesaĝojn de la antaŭaj generacioj de esperantistoj, kaj per la libroj, kiujn ni eldonas nun, ni mesaĝas al la postaj generacioj, ni faras al ili konfeson pri niaj ĝojoj, zorgoj, la plej delikataj animagordoj kaj angoroj. Oni ne miru do, ke recenzoj en tiu ĉi numero plenigas sep paĝojn – oni legu ilin: en la recenzoj spertaj legantoj raportas pri siaj legimpresoj, dezirante inviti vin al aventura enfotela vojaĝo tra la Esperanta libraro.

Tamen, ne la tutan numeron plenigas recenzoj. Restis abunde spaco ankaŭ por poemoj: aperas en fidele bela traduko unu el la ĉefverkoj de Attila József, elstara kreanto de la ĉi-jarcenta hungara liriko. Daŭrigante la prezentadon de la sama poemo en paralelaj tradukoj, nun ni publikigas poemon de Miklós Radnóti (1909-1944) en la esperantigoj de Ferenc Szilágyi kaj Imre Szabó. Aldoniĝas al la literaturaj pecoj de tiu ĉi numero la animkirla novelo „Vertiĝo" de István Örkény, poemo de Mihály Gergely kaj du originalaj poemoj.

Sur la sekva paĝoparo ni prezentas la hungaran departementon Szolnok, aperas artikolo pri la neignorebla fakto, ke ĉ. unu triono de hungaroj vivas ekster Hungario, kaj la redaktoro de „Világ és Nyelv" (Mondo kaj Lingvo) polemikas kun letero veninta de la Gazetara Oficejo de la brita ĉefministro, kiu letero estas klasike bela pruvo de lingva imperiismo.

Iom detale ni prezentas la interesan hungarlingvan libron „A világnyelv" (La mondlingvo), lingvistika antologio pri mondlingvaj problemoj – en ĝi cetere legeblas multaj argumentoj pri tio, kial la angla lingvo ne taŭgas por mondlingva rolo. Sed, bedaŭrinde, Hungara Vivo ne havas abonanton en la Downing-strato n-ro 10...

REGIONOJ DE HUNGARIO

Departemento Szolnok

Rigardante la mapon, ni povus diri, ke ĝi situas en la mezo de Hungario. La departemento, limigita ĉe ĝia okcidenta rando per la rivero Tiso, estas tute ebenkaraktera teritorio. La naturamikoj, kiuj ĝenerale ŝatas la variajn pejzaĝojn, certe ne preferas tian regionon al tiu de monta pejzaĝo. Tamen tiuj, kiuj interesiĝas pri la historiaj memorajĵoj aŭ popola arto, trovas multe da vidindajĵoj en la departemento, kiun – pro la abunda tritikproduktajĵo – oni kutimas nomi „manĝajĵprovizejo" de Hungario. La rivero Tiso proponas riĉajn sporteblecojn por la ŝatantoj de la apudakva vivo.

La kultura kaj administra centro de la departemento havas la saman nomon: *Szolnok* (solnok). La urbo, havanta 50 000 loĝantojn, havas malantaŭ si 900-jaran historian pasinton. Ĝi konstruiĝis sur la meza parto de la Granda Ebenajo, kaj tiel ĝi fariĝis natura ekonomia, trafika centro de la regiono de Meza-Tiso. Pro siaj ripozejoj kaj banejoj ankaŭ el fremdultrafika vidpunkto ĝi akiras ĉiam pli konsiderindan rolon.

Dum la mezepoko oni konstruis ĉirkaŭ la urbo grandan fortikajĵon, tamen dum la militiro de la turkoj, en 1552 ĝi ne povis kontraŭstari. Poste la turkoj tie elformis unu el siaj gravaj rezidejoj, kaj helpe de la hungara loĝantaro ili konstruigis la unuan ponton super Tiso. La urbo estis scenejo de grandsignifa evento en 1847, kiam sur la fervoja linio de Peŝt–Szolnok ekfunkciis la fervoja trafiko. Gravaj militeventoj okazis ĉe la limo de Szolnok dum la liberbatalo en 1848/49. En la dua duono de la deknaŭa jarcento komenciĝis rapida evoluo en la urbo, al kio kontribuis la tie trapasantaj gravaj fervojlinioj.

En 1876 Szolnok fariĝis la centro de la departemento, sed ĝis la dua mondmilito ĝi restis agrarkaraktera urbo. La industria evoluo komenciĝis post la dua mondmilito. Konstruiĝis multaj uzinoj de la Apud-Tisaj Kemiaj Fabrikoj.

Ĉi tie formiĝis la Ebenaĵa Centro de la nafto-esplorado. Ankaŭ la kulturaj institucioj, teatro kaj altlernejoj kontribuas al la graveco de la urbo. Ĉe la renkontejo de gravaj fervojlinioj oni konstruis unu el la plej modernaj stacidomoj de Mez-Eŭropo.

La muzeon de la urbo – entenantan restintaĵojn de diversaj historiaj epokoj – oni nomis pri János Damjanich, legenda figuro de la liberbatalo 1848/49. La urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo post la liberbatalo fariĝis ĉiam pli populara temo de pentristoj, kiuj komence de la kuranta jarcento fondis la Asocion de la Artkolonio Szolnok-a.

El inter la provincaj urboj de la departemento *Mezőtúr* apartenas al la pli grandaj urboj (26 000 loĝantoj). Ĝi estas unu el tiuj kamparan-urboj, kiuj plej frue komencis la kooperativan mastrumadon. Nuntempe la Agrara

Nova kvartalo kun moderna monumento en Szolnok



Maŝinindustria Altlernejo helpas en la urbo la instruadon de la estontaj specialistoj. La urba gimnazio havas kvarcentjaran pasinton.

La urbo iam estis fama pri siaj potist-majstraĵoj. Jam je la fino de la dekoka jarcento estis tre serĉataj la akvokruĉoj tie faritaj. Ankaŭ nuntempe pluraj potfaristoj laboras en Mezőtúr.

Túrkeve (kun 12 000 loĝantoj) ankaŭ estis en la avangardo de la agrarkooperativa movado. Vidindaĵo de la urbo estas la Muzeo Finta, kiu prezentas la artajn skulptaĵojn de Sándor kaj Gergely Finta, naskitoj de la urbo.

Karcag (27 000 loĝantoj) iam estis la ĉefloko de tiu distrikto, kiun oni nomis en la departemento „Nagy Kunság" (nadj kunŝag), nun centro de agrarkaraktera regiono. La urbo estas riĉa je artmemoraĵoj, tamen ĝian plej freŝan frekventecon ĝi akiris per sia 72°-a kuracakvo, kiun oni utiligas por la kuracado de reŭmatismaj malsanuloj.

Ĉirkaŭ ĝia banejo diversaj establaĵoj servas la komforton de la gastoj. Somere internacia bus-trafiko veturigas la bangastojn el Ĉeĥoslovakio.

Törökszentmiklós (tereksentmiklos) kun siaj 25 000 loĝantoj estas agrikultura centro, kun diversaj agrar-industriaj establaĵoj.

La nordan parton de la departemento okupas alia specifa teritorio de la departemento, la t.n. „Jászság". El inter la urboj de tiu regiono la plej granda estas *Jászberény* (jasberenj), kun 33 000 loĝantoj. Ĝi situas sur ambaŭ bordoj de la rivereto Zagyva (zadjva). Ĝiaj institucioj kun historia pasinto, konsiderindaj artmemoraĵoj kaj idilia ĉirkaŭaĵo sur la bela insulo de Zagyva, altiras ĉiam pli da vizitantoj al Jászberény.

La loĝantaro antaŭe okupiĝis ĉefe pri bestbredado. En la foiroj de Jászberény multaj homoj de la ĉirkaŭaĵo ŝanĝis (vendis, aĉetis) siajn bestojn, ja la plimulto de la loĝantaro vivtenis sin el sia bieno. Nun Jászberény havas plurajn fabrikojn kaj kelkaj el ĝiaj produktaĵoj jam atingis eksportkapablon.

Nuntempe en la departemento funkcias E-grupoj en Szolnok, Jászberény kaj Mezőtúr. Ilia membraro sumas ĉ 60.

La grupo de Mezőtúr jam de jaroj organizas internacian labortendaron por junaj esperantistoj, en la loka agrar-kooperativo. Pasintjare tion partoprenis 35 gejunuloj.

Esperanto-kursoj por plenkreskuloj okazas en la urboj Szolnok kaj Jászberény.

István *László*

Panoramo de Szolnok

Hungaroj ekster Hungario

Hungaroj ekster Hungario... Tiu fakto estas riĉa grundo por ŝercaj anekdotoj de la jena tipo: arabo kaj indiano fariĝas ŝiprompiĝintoj sur la Atlantika Oceano. Ili provas interkompreniĝi, sed tio sukcesas per neniu el la konataj „mondlingvoj". Fine unu el ili perdas la paciencon, kaj kolere elbuŝigas en nekonata lingvo. „La infero englutu tiun ĉi ŝtipkapulon, se li ellernis neniun lingvon! " La alia ekkridetas, kaj respondas en la sama lingvo, la hungara: „Ŝtipkapulo estas vi, kial vi ne tuj komencis hungare? "

En la anekdoto kompreneble troviĝas ne malmulte da troigo, sed estas fakto, ke la hungaran lingvon parolas denaske 15,5 milionoj da homoj, kaj el ili ĉ. unu triono, preskaŭ 5 milionoj da homoj vivas ekster la limoj de Hungario. Kiel tiu situacio kreiĝis? Ĉi-sube ni provas doni koncizan historian superrigardon.

Pro la malriĉaj ekonomiaj cirkonstancoj kaj la tempestoplena enlanda politika historio jam dum la pasinta jarcento miloj da hungaroj forlasis sian landon, ĉu esperante pli kontentigajn vivkondiĉojn alilande, ĉu rifuĝante de antaŭ venkintaj politikaj kontraŭuloj. La nombro de la elmigrintoj estis aparte alta inter la jaroj 1890-1910: ili estis grandparte senhavaj kamparanoj; la plimulto deziris atingi Usonon, tie kolekti iom da mono, kaj poste reveni al la hejmlando. Kompreneble pri tio sukcesis nur malmultaj.

Sekve de la novaj landlimoj, kreitaj de la packontraktoj post la unua mondmilito, ĉirkaŭ tri milionoj da hungaroj ĉesis esti hungaraj civitanoj sen tio, ke ili forlasus sian naskiĝvilaĝon. Ili fariĝis naciaj minoritatoj en ĉiuj landoj, najbaraj al Hungario.

Kaj daŭris ankaŭ la elmigrado. Post la falo de la Konsilia Respubliko somere de 1919 elmigris komunistoj kaj socialdemokratoj, inter 1929-1933 forpelis aron da homoj la sekvoj de la mondekonomia krizo, fine de la tridekaj jaroj judoj rifuĝis de antaŭ la persekutado. Post 1945 estis pluraj ondoj de la elmigrado: unue forlasis la landon multaj funkciuloj kaj adeptoj de la intermilita reĝimo, kaj poste varia gamo de tiuj personoj, al kiuj ne plaĉis la socialisma transformiĝo en Hungario. Estis tre signifa la nombro de la judoj, kiuj tuj post la milito elmigris al Palestino, respektive al Israelo – 115.000. Tiuj ondoj daŭris ĝis ĉ. 1949-1950. Nur kelkajn jarojn poste, inter 1956-1960 pli ol 200 mil hungaroj forlasis Hungarion. El ili fakte nur eble la dekono faris tion pro politikaj kaŭzoj: la ceteraj serĉis novan patrujon pro ekonomiaj, ofte pro tute privataj kaŭzoj (por liberigi sin de la edzo, edzino, familio ktp.) aŭ simple pro aventuremo.

Ankaŭ dum la pasintaj du jardekoj la elmigrado ne ĉesis, sed ĝiaj dimensioj restas inter la normalaj kadroj – oni forlasas la landon plejparte pro edz(in)iĝoj al eksterlandanoj aŭ aliaj familiaj kaŭzoj. Ĉi-sube vidu malgrandan statistikon pri la nombro de hungaroj ekster Hungario. Ĝi baziĝas plejparte sur pritaksoj, tamen, ĝi taŭgas doni proksimuman bildon pri la nombro de hungaroj, vivantaj en diversaj landoj. (La ciferoj estas ĉerpitaj el la libro de Kázmér Nagy: Elveszett alkotmány (Perdita konstitucio), Budapeŝto, 1984.).

En najbaraj landoj:

Aŭstrio	60 000
Ĉeĥoslovakio	840 000
Jugoslavio	700 000
Rumanio	1800 000
Sovetio	150 000

Entute 3 550 000 personoj.

En aliaj Eŭropaj landoj:

Benelukso	25 000
Britujo	25 000
Francio	50 000
FRG	50 000
Italio	10 000
Svislando	15 000
Skandinavaj landoj	25 000
Ceteraj landoj	5 000

Entute 205 000 personoj.

Somera lernejo en Hungario por la infanoj de eksterlande vivantaj hungaroj

Ekster Eŭropo:

Aŭstralio	40 000
Afriko	20 000
Usono	700 000
Sud-Ameriko	100 000
Kanado	100 000

Entute 960 000 personoj.

Estas interese mencii, ke fine de 1964 aperis entute 219 hungarlingvaj gazetoj en 24 landoj, ne kalkulante la hungarlingvan gazetaron de la hungaraj naciaj minoritatoj en la najbaraj landoj. (Pli freŝaj indikoj mankas.) Jen, la koncernaj landoj, parenteze staras la nombro de la hungarlingvaj periodaĵoj:

Argentino (10), Aŭstralio (9), Aŭstrio (11), Belgio (3), Brazilo (2), Britio (8), Danio (1), Francio (8), FRG (26), Hindujo (1), Italio (1), Israelo (3), Kanado (27), Nederlando (2), Norvegio (2), Nov-Zelando (1), Portugalio (2), Sud-Afrika Respubliko (1), Svedio (5), Svislando (8), Tajvano (1), Urugvajo (3), Usono (80), Venezuelo (4).

Tiu fakto, ke praktike ĉiu tria hungaro vivas ekster la limoj de Hungario, metis la taskon por la hejmlandaj – ĉefe kulturaj – instancoj trovi la manieron teni vivaj la kontaktojn de tiuj hungaroj kun Hungario, kun la hungara kulturo.

Necesas tamen klare distingi inter la elmigrintoj kaj tiuj hungaroj, kiuj fariĝis civitanoj de aliaj landoj sekve de la packontraktoj post la unua mondmilito. Tiuj lastaj fakte ne perdis sian kulturan grundon, ja ili kiel antaŭe vivas en la sama loko, kreas kaj konsumas propran hungaran kulturon. En ĉiuj najbaraj landoj, precipe en Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio kaj Rumanio, ekzistas vigla hungara kultura vivo, kaj kreiĝas valora hungara literaturo. La hungaroj, vivantaj en la najbaraj landoj, havas ankaŭ gravan mision: ilia agado povas servi kiel ponto de amikeco inter la hungara popolo kaj la popoloj de la najbaraj landoj. Ili estas lojalaj civitanoj de la koncernaj ŝtatoj, sed samtempe ili havas specialan, ĉefe kulturan ligitecon al Hungario. Estas senduba afero, ke tia nobla misio estas tre aktuala kaj dezirinda en la nuna mondo.

Alia estas la kazo de la elmigrintoj, kiuj ne nur ŝanĝis ŝtatanecon, sed perdis sian tutan vivofonon, kaj ekloĝis en tute fremda medio, eble je dekmiloj da kilometroj for de la hejmlando. En tia situacio la ligoj al la hejmlanda kulturo estas malfacile varteblaj sen la aktiva helpado fare de la hejmlando. Estas notinde, ke intertempe naskiĝis ankaŭ novaj generacioj: la gefiloj kaj genepoj de la iamaj elmigrintoj. Ofte ili estas nur duonhungaroj, ĉu per la patro, ĉu per la patrino, tamen, ili serĉas siajn radikojn, kaj deziras funde konatiĝi kun la kulturo, kiu nutris la gepatrojn aŭ unu el ili.

Tiujn strebojn klopodas helpi la organizo *Monda Federacio de Hungaroj,* havanta sian sidejon en Budapeŝto. Tiu ĉi organizo informas la eksterlandajn hungarojn pri la ebloj de vizitado hejmen, abonado de hungaraj revuoj, aĉetado de hungaraj libroj, ĝi organizas lingvajn tendarojn, somerajn universitatojn speciale por eksterlandaj hungaroj ktp. Ĝi neniel volas „relogi" la elmigrintojn hejmen – kvankam kompreneble Hungario volonte reakceptas tiujn, kiuj deziras reveni –, male, la Monda Federacio de Hungaroj konsilas al ĉiuj esti lojalaj civitanoj de sia nova patrujo, kaj tiel akiri ĉie en la mondo honoron por la hungaroj kaj ankaŭ Hungario.

Inter la hungaraj elmigrintoj, vivantaj dise en la mondo, troviĝas tre multaj elstaraj scienculoj kaj artistoj (Albert Szentgyörgyi, János Sellye, Victor Vasarely, Amerigo Tot ktp.), tamen la plimulto estas ne famaj, sed diligente laborantaj, simplaj homoj, kiuj ordinare havas bonan reputacion en sia nova medio. Estas notinde, ke inter ili troviĝas ankaŭ esperantistoj, eĉ abonantoj de Hungara Vivo, kiu por ili servas kiel speciala fadeno al la hejmlando.

Vilmos *Benczik*

Konferenco pri la eksterlanda pozicio de la hungara lingvo

Akcepto por la partoprenantoj de la konferenco

Attila József
(1905-1937)

URBORANDA NOKTO

Lumoj el la kort' profunda
sian reton jam elprenas;
kiel kavo akvofunda,
nia ĉambro ombroplenas.

Muto – rampe ekpiedas
la lavbroso kun oscedo;
super ĝi jen fali pretas
hezitanta murpeceto.

La nokto haltas surĉiele,
en ĉifonoj ĝemas;
urborande lokon prenas.
Tra plac' ekamblas ĝi sencele,
prenas iom da lun' por esti hele.

Mornas plie ol ruinoj
la uzinoj,
sed ene
masiviĝas la malhelo plene,
bazo de silento.

Tra lukoj de teksaffabrikoj
lunlumo falas;
en faskoj aras,
fadene lunradioj palas
sur la teksiloj monstre krudaj;
tranokte, dum senfare staras,
teksadas morne la maŝinoj
sonĝetojn de la teksistinoj.

Apude, kiel volbaj kriptoj,
cemento-, fero-, ŝraŭbfabrikoj.
Jen, familiaj tombosinoj.
Konservas tiuj ĉi uzinoj
sekreton morne resurekti.

Sur la barilo kato gratas,
noktogardisto superstiĉa
fantomon, lucern-signon vidas –
kaj la dinamoj skarab-dorsaj
en metalbril' tepidas.

Vagonarfajfo.

Palpas malsek' en ombrogarbo,
en branĉoj de falinta arbo,
kaj plipezigas
la vojan polvon.

Survoje policano, laborulo.
Kun flugfolioj en obskuro
jen kamarado.
Li, kiel hundo, esplor-flaras
kaj, kiel kato, orelumas;
danĝeras, kie lampo lumas.

La drinkejbuŝ' lumaĉon vomas,
ĝia fenestro flakon ŝvitas,
interne lampo sinke dronas,
taglaboristo sola sidas.
La drinkejmastro dorme soras.
Sed li al mur' grimacas iom,
altajdas lin amar' – li ploras,
vivuas la revolucion.

La akvoj klakaj pli rigidaj
ol ercoj elgisitaj.
La vento kiel hund' vaganta
alkuras akvon, ĝia granda
lango akvaron voras.

La pajlosakoj, kiel flosoj,
ŝvebmutas sur la noktaj ondoj –

Tenejo barke sin ellevas
kaj ferboate gisuzino,
gisisto ruĝan bebon revas
mildeti en la gisuj-sino.

Ĉio malsekas, ĉio pezas.
Pri la landaro de l' mizero
la ŝimo mapon jen sintezas.
Kaj tie sur la kalva tero,
sur herb-ĉifonoj jen papero,
ĉifonoj. Ili rampus! Tremas,
sed eki jam malfortas....

Via malseka vent' obskura:
flirtado de tukeg' malpura,
ho nokto!
Perkalo ŝnure: sur ĉielo
vi pendas kiel la sufero
survive, ho nokto!
Nokto de malriĉuloj! Braĝo
vi estu por la kor' – kuraĝo,
elfandu feron en mi febran,
amboson firman, nerompeblan,
martelon tinte fulmomovan,
– susuran klingon venkotrovan,
ho nokto!

Noktas peze, noktas ŝlime.
Fratoj, dormos ankaŭ mi jam.
Sensuferu ni anime.
Verm' evitu korpon nian.

El la hungara: Imre Szabó

István Örkény
(1912-1979)

VERTIĜO

Pigre en densaj flokoj falis la neĝo, en la neĝo-vato akre sonis la tintado de la tramoj, la taksioj glitadis. La urbo ŝajnis nekonata kaj tra la blanka neĝkurteno ĝi estis kvazaŭ minaca, sed Etel ridete venis ne ekvidante la mornecon de la vintro. Ŝi estis malsata, ĝojis pri la vespermanĝo, deziris konversacii kaj anticipe ĝojis pri la societo. La rideto ludis ankoraŭ sur ŝiaj lipoj, kiam ŝi premis la butonon de la sonorilo.

Szenczi malfermis la pordon. Li mankisis al ŝi kaj tuj ekamindumis ŝin. „Kiel bela vi estas, Etel! " Kvankam ŝi ne estis bela, nur ardis de vivoĝojo kiel granda elektra ampolo. „Ho, mia Dio, ĉu mi malfruis – ŝi demandis ŝajnigante iom da ekscito. – Ĉu mi venis lasta? Kaj mia edzo, ĉu li estas jam ĉi tie? " – „Ankoraŭ ne" – trankviligis ŝin Szenczi. – „La flegistino de Laci telefonis, ke la operacio ankoraŭ daŭras, ni altabliĝu sen li... kaj Szenczi diris al sia edzino. – „Judit, vi povas surtabligi la vespermanĝon! "

En la ĉambro brakplektante al ŝi, li prezentis la malfruintan gastinon. „Kiun vi ne konas, Etel? " Ŝi konis Kálvin, eĉ, iam ŝi amis lin; ĉe la manpremo ŝi lasis sian manon en la lia dum unu minuto. „Venu Etel... Permesu prezenti al vi sinjoron Turánszki. Li donis rifuĝejon al Judit en la tempo de la sagokrucanoj... – Poste li aldiris: – Turánszki estas poeto, ĉu vi scias? "*

La malhelhaŭta Turánszki stariĝis kaj glutis. Lia maldensiĝinta hararo kreskis sur du lokoj de lia kapo kaj hirtiĝis en du bukloj. Li staris malaplombe, ĉiam ĝenate, se iu lin nomis poeto ĉe aŭdo de liaj oreloj, kaj nun precipe ĝenis lin la paŭzeto inter „li donis rifuĝejon al Judit" kaj la vorto „poeto". De dudek jaroj Turánszki ne verkis poemojn. Aŭ ĉu eblas, ke neniam? Antaŭlonge li havis tabak-distribuejon, tio estas sciata. Ĉu Szenczi mokas lin? – turniĝis la penso en lia kapo, sed li eraris, ĉar Szenczi ne mokis lin; Szenczi estas prokuroro, por li ĉiu metio estas samvalora, ĉu iu estas poeto aŭ porkafisto. La paŭzeto, tiu drameca ekspiro tute ne rilatis al la poeto, sed al si mem, al la vortoj: „en la tempo de la sagokrucanoj." Tiu tempo estis la granda turnopunkto, la granda memoro, la granda konsterniĝo de Szenczi kiel en la vivo de la fervoja hejtisto tiu terura nokto, kiam li kunpuŝiĝis kun la rapida trajno kureganta el la kontraŭa direkto. Eĉ hodiaŭ, post paso de jaroj, por Szenczi nur du specoj de homoj ekzistas: tiu, kiu donis kaŝejon kiel Turánszki, Kálvin aŭ Etel Káldi, kiu savis sian edzon – kaj tiu kiel Káldi aŭ kiel Judit aŭ li, kiujn oni kaŝis, kiuj estis persekutitaj. Szenczi ĉiam portis la flavan sespintan judan stelon, sed nun enkore, sub la vesto.

Ĉe la tablo Turánszki sidis vidalvide al Etel, kaj ankaŭ li tuj gluis sinforgese la rigardon sur ŝiaj famaj belaj okuloj, kiuj brilis brune kiel el tero fus ŝprucinta kruda nafto, sed profunde en la fundo, orbuletoj ek- kaj ekbrilegis en ili. Ĉi tiuj kelkaj orbuletoj estis sufiĉaj por veki en ĉiu viro la aventuriston, la tromp-kartludiston kaj la or-fosiston. Turánszki senapetite manĝis ion, nur per dentopintoj. „Nuntempe ne eblas verki – li ekvoĉis, ĉar la paŭzeto ĉe la prezentiĝo eĉ nun restis en lia kapo. Al li estis la sento, ke li devas doni klarigon. – Kiu scipovas verki niatempe? La verkisto silentas, li promenigas sian hundon, eĉ taglibron ne skribas.... Kial? Al kiu? Pro kio? " – „Sed kial ne verkas ili?" – demandis Etel, kiun absolute ne interesis, ĉu la verkistoj verkas aŭ ne. Sed ŝi vidis la ekscitiĝon de Turánszki kaj ŝi tiel faris al li la demandon kiel oni enigas la vaporon en la kaldronegon.

La demando ekscitis Turánszki. „Ja certe vi scias, sinjorino, ke la koalicio de la partioj... – li diris. Etel kapjesis, kvankam ŝi ne sciis, kio estas tio. Turánszki daŭrigis, – La registara partio direktas troe nian vivon... Kion diri pri ĝi? La arto komenciĝas tie, kie la konsento, la rezignacio je ĉio finiĝas, ĉu ne? La vojo estas longa, ĝi daŭras de la kolero ĝis la ribelo, sed tiam la kapjesado ne havas sian lokon. Kaj ni verkistoj..." De kiam li verkis, li parolis ĉiam en pluralo, ex cathedra, *en la nomo de ĉiuj verkistoj. Li tenis sin kiel ambasadoro de la hungara literaturo kaj en ĉi tiu rolo li deklaris: – „Aŭ la koalicio aŭ la artoj..." Tiumomente eksonis la sonorilo. Etel suprenrigardis. „Mia edzo." – „Varmigu la vespermanĝon" – diris Szenczi al-sia edzino, sed Etel nee skuis la kapon. Post operacio li ne kapablas manĝi eĉ panpeceton. Li similas al febra malsanulo, estas nur soifa, sed ne havas apetiton... Kafon? Tion jes. Kafon kaj konjakon. Ĝis li trankviliĝas. Káldi sidiĝis apud la edzinon de Szenczi, sur la neokupita seĝo. „Preskaŭ mi ŝtopiĝis – li diris – estas neeble havigi neĝoĉenon por la aŭtoradoj." Li tiel trinkis la konjakon kiel la glavartifikisto glutas la glavon kun retrofleksita kapo. Ĉiu lia movo estis iaspeca prezentado. Kiam li enpaŝis, la ĉambro tuj pleniĝis de la odoro de etero, de ia densa vesta varmo, kvazaŭ oni estus bovinon enpelinta. Li estis de malalta kresko, diktrunka, nura muskolo – kaj nun al tio: ia nekutima interna febro, streĉiteco, ekscitiĝo... „Ĉu vi trinkis? " – demandis Etel. „Du glasetojn da konjako post la operacio... Ĝi estis tre malfacila spin-operacio. Du ŝrotoj en la lumbo-vertebraro..." Etel rigardis lin. Ankaŭ hodiaŭ post dek jaroj ŝi amis lin kaj eĉ pli nun, ĉar fine tiel malfrue kaj neatendite ŝi estas graveda de kvin monatoj kaj pri tio nur kelkiuj sciis, ĉar je Etel ankoraŭ nenio vidiĝis. Ŝi estis pli svelta ol iam ajn kaj ankaŭ pli feliĉa; nome ĝis nun por ŝi, bedaŭrinde, tio estis neebla. Káldi tiris sur sin la atenton fine de la dudekaj jaroj per du sciencaj studoj. Li komencis sian karieron kiel geniulo, sed*

kiel judo li ne ricevis universitatan katedron. Li fariĝis kirurgo, poste ĉefkuracisto kaj baldaŭ li famiĝis. Li neniam fariĝis scienculo. Eĉ ne hodiaŭ, kvankam li estis la unua, kiu estis rekonita post la liberiĝo de la lando, sed nun por esti tiu, jam maleblas por li, la scienco preterpasis lin.

Nur ili du trinkis. Turánszki kaj li; kiam la poeto etendis la glason direkte al li, li glastintigis kaj diris: „Je via sano..." Nu, kiu vi estas? – li demandis en si mem; al li venis en la kapon, ke li ne prezentis sin. Nun tio estus jam malebla. Turánszki daŭrigis la toston. „Mi ne estas partiano... La komunistoj pli-malpli frue certe nomumus min ŝtatsekretario..." Li eksilentis, ĉar iu por lin averti surtretis lian piedon. Sinjorino Szenczi ekmemoris, ke Káldi estas komunisto. Povas esti, ke li ofendiĝas. Sed Káldi nur ridetis, rigardis la poeton, ĉu li parolos plu? Turánszki sentis, ke li ekiris vojon malĝustan. Prefere li trinkis. La edzino de Szenczi time lin rigardis. „Mia Dio – ŝi demandis subite –, spin-operacio estas tre danĝera, ĉu ne?"

Káldi ŝultrotiris. – Ankaŭ la gripo estas danĝera, kaj li versis el la botelo. Etel ektime forprenis la botelon. „Sufiĉe, Laci." „Nur kelke da gutoj." Jam ne la soifo, sed la duonebrio postulis la trinkafon. „Spin-operacio? Iam mi havis... Ĉu mi ne rakontis ankoraŭ tion? Eĉ ne al vi, Etel? Vere, eĉ ne al vi? Tio okazis post la sieĝo de Budapeŝto. Iumatene venis knabino en la hospitalon. Deksep-jara... Ĉu vi aŭdas, Kálmán? Ĉu ni scias ankoraŭ, kion signifas esti deksep-jara? Kaj ŝi estis blonda kiel... sekalspiko. Kaj bela kaj ŝi ridetas kaj diras: „Sinjoro profesoro..." Seninterrompe ŝi ridetas kiel tiu, kiu ĉiam aŭdas muzikon, dolĉan, foran muzikon. Tiun muzikon nur mi pensis aŭdi. Ŝi estis sole juna, feliĉa, milda kaj... paralizita je la maldekstra gambo. En ŝia vertebraro troviĝis du fersplitoj. Ŝi povis marŝi, sed pene tiris la maldekstran piedon... Kio do? Kio estas al vi?"

La okuloj de Turánszki ekflamis kaj kiel tiuj de virkato ardis; tra lia gorĝo eliĝis duonvoĉo. fragmento de englutita frazo. „Nenio. Nur daŭrigu la rakonton. Kia estis tiu knabino?" – „Kia? Mi jam diris, ŝi estis bela. Mi faris radioskopion pri ŝi; du fersplitoj en la vertebraro. Fraŭlino – mi diris al ŝi – ili estas tre malfacile atingeblaj." „Sed sinjoro profesoro, mi volas vivi..." „Fraŭlino – mi respondis – la risko de la operacio estas tre granda. Eblas, ke ĝi estas letala. Povos okazi, ke via sanstato plimalboniĝos, vi tute paraliziĝos! ... Via ŝanco resaniĝi estas dudekkvin procentoj..." Ŝi fetas sin al mia kolo. „Sinjoro profesoro, se dek, se kvin, se unu... Mi ne volas resti kripla. Operaciu min, sinjoro profesoro, ŝi diris, kaj alkroĉiĝis al mia kolo kaj ŝi ridas kaj ŝi estas feliĉa. Jen la juneco!"

Etel observis Turánszki, kiu sidis senmove, sed interne li ardis-flamis kiel ferfandejo. Ankaŭ la demando tiel ŝprucis el li kiel fajrero. „Ĉu vi operaciis ŝin?" – „Atendu..." „Ĉu vi operaciis ŝin?" – „Mi rakontos plu, atendu. Trinku ion. Ankaŭ vi, Etel... Mi operaciis ŝin. Sed ŝi kuŝis en la hospitalo dum du semajnoj antaŭ la operacio; mi faris ĉirkaŭ dudek Rentgen-fotojn, mi preparis min... kaj ŝi nur ĝojis, ridetis, ŝi ravis la tutan kirurgan sekcion, la malsanulojn, la kuracistojn kaj la flegistinojn, eĉ la maljunan Valerian, tiun sekiĝintan arbon, Etel ŝin konas..." Etel kapjesis. „Kaj ĉu ankaŭ vin?" – „Ankaŭ min ŝi ravis, mia karega". – „Etel estas faluza" – ekvoĉis triumfe Kálvin, la eterna fuŝulo de ĉio bona. „Etel ne estas faluza. Ĉu ne, Etel?"

Etel ne estis faluza. Ŝi nur iom vertiĝis; povas esti, ke „pro tio" aŭ pro la konjako. Káldi parolis plu pri la knabino. Kiel profunde ŝi dormis, estis iome pigra, babilema, scivolema, klaĉema, do deksep-jara babilulino... Oni nomis ŝin Etulinjo. – „Vi diras, ke Etulinjo?" – „Jene ŝin nomis ĉiu. Kaj ĉu ĉi tiu nomo estis karakteriza por ŝi ..." „Vespere, antaŭ la operacio ni estis en la operejo, ĉar Etel aĉetis abonbiletojn. Post la opero mi aĉetas vesperan furnalon, mi legas ĝin enlite kaj... „Policaj novaĵoj. Komunikaĵo de la politika sekcio. Estas serĉata knabino, la teroristino de la sagokrucana domo en la strato Urbodomo, certa Maria, la nomo ne gravas, deksep-jara, blonda hararo, bluaj okuloj, ŝi murdis cent dek du homojn..." Mi kuŝis rigide en la lito kiel kadavro... Etulinjo estas serĉata.

La edzino de Szenczi alkroĉiĝis al sia edzo, sed la teruro trakuris ankaŭ tiun. Turánszki laŭŝajne trankviliĝis. Nur lia voĉo aŭdiĝis raŭke. „Kaj ĉu vi denuncis ŝin?" – „Atendu. Mi jam diris, ke mi operaciis ŝin. Sekvatage de la oka ĝis la dekunua. La operacio daŭris tri horojn..." „Kaj poste? Ĉu vi denuncis ŝin?" Káldi mire alrigardis lin. Li nur ekvidis tion, kion la aliaj jam delonge vidis, ke nur jam ne temas pri la operacio... „Ŝi ricevis sal-solvaĵon kaj posttagmeze iom da kafeino... Kio estas al vi, Etel?" Etel denove sentis la vertiĝon, sed nun jam ne „pro tio" ŝi vertiĝis. Ne pro la infano.

Ne nur ŝi vertiĝis. La geedzoj Szenczi sidis palmiene kaj timtreme rigardis la blankan vivon en la kristalaj glasoj. Lajos Kálvin rigardis la alifoje ĉiam senvortan Káldi. Li povis danki al tiu, ke li nun troviĝas ĉi tie, ke li estas glate pensiita, kvankam dum dek kvin jaroj li laboris en la kontraŭspiona servado... Eĉ sian vivon li oferus por Káldi. Ankaŭ li vertiĝis, ne nur Etel. Kvazaŭ muta, silenta tertremo skuas ilin, la domon, la straton Malnova Poŝto, la tutan Budapeŝton. Ne balanciĝis la lustro, la mebloj ne kraketis, sismografo ne registris la intenson. Ĉion ĉi sentis nur ili. Etel vertiĝis, la edzino de Szenczi tremis, Lajos Kálvin sentis pikon ie en sia koro. Jene ni vivas – li pensis angore. – Kia urbo, kia lando, kia vivo! Unu miliono da homoj, la duono estas mortiginto, la alia duono estas viktimo. Kaj li pro tio pensis, ke estus bone eskapi kun Etel ien, tre malproksimen kaj vivi trankvile kun ĉi tiu energiplena, por la feliĉo naskita, aplomba virino. Etel estas fakte tre forta.

Sed Etel jam ne estis tia. Ŝia vido vibris, ŝiaj oreloj muĝis, iom post iom la ĉambro renversiĝis ĉirkaŭ ŝi. Ŝi apenaŭ aŭdis la voĉon de Szenczi. „Mi scias pri la afero. La popola tribunalo kondamnis ŝin je morto." Káldi kapjesis, versis, trinkis. „Mi estis tie – li diris acidmiene. – Laŭ la atestantoj Etulinjo surhavis uniformon, botojn kaj kunportis maŝinpafilon. Ŝi aranĝis la ekzekutojn." – „Ne estas vere/" – diris Turánszki. „Dudek atestantoj konfirmis. Foje,

post la pafaro, ŝi alpaŝis al la muro. Dudek sep kadavroj kuŝis surtere, ok familioj. Ŝi demandis: „Ĉu iu vivas?" – „Tio ne estas vera! " – „Estis atestantoj! "„Ĉu iu vivas? " – demandis Etulinjo kaj naŭ-jara knabeto stariĝis kaj diris: „Onjo, mi vivas." Tion diris la knabeto kaj Etulinjo mortpafis lin." – „Mensogo..." „Tio ne estas mensogo. Mi ĉeestis la tribunalan proceson. Etulinjo ridetis, eĉ ŝi salutis min, mansignis, ke mi ne timu, ankaŭ ŝi ne timas." – „Ĉar ŝi fidis vin. Ĉar vi operaciis ŝin." – „Jes, ĉar mi operaciis kaj sanigis ŝin. Dum kvar semajnoj ŝi kuŝis en mia sekcio." – „Kaj poste? " – „Poste ŝi estis arestita." – „Ĉar vi denuncis ŝin." – „Ĉar mi denuncis ŝin." Turánszki lasis fali la manojn sur la tablon. „Vi estas malkuraĝa." – li diris mallaŭte. Káldi klinis sin antaŭen kaj flustre demandis: „Nu, kiu estas vi? Kaj kiom koncernas vin Etulinjo? " – „Etulinjo estis mia filino. Mia pli juna filino..." La voĉo estis tiu de ploranta homo. Sed Turánszki ne ploris. Li alpremis la manplatojn sur la tabloplaton. Ankaŭ sub li ekmoviĝis la tero.

„Nun mi tre vertiĝas, Laci..." Káldi brakplektis al ŝi kaj kondukis ŝin el la ĉambro. La geedzoj Szenczi duonsvene staris en la antaŭĉambro kaj helpis al ili surmeti la surtutojn. „Mi suprenigos la lifton..." Sed Káldi prenis sian edzinon en la brakojn portante ŝin kiel infanon. „Ĉu vi vertiĝas ankoraŭ? Spiru profunde kaj ĉirkaŭprenu mian kolon..." Eĉ tio ne helpis. Ekstere agrabla vento blovetis, la neĝado ĉesis kaj la aŭto glate kuris hejmdirekte – kvazaŭ nenio estus okazinta – inter la bone konataj surstrataj neĝamasoj en la distrikto Pasarét. Bela, neĝa, vintra vespero. Sekura, trankvila vivo kaj paco al la homo de bona volo. En ŝi sub la koro estas la infano, kiu naskiĝos por pluvivi en ĉi tiu sekureco kaj paca silento... Kaj subite elpaŝas el la estinteco blonda knabino kun dolĉa rideto survizaĝe, en sia mano kun maŝinpafilo kaj per ĝi ŝi ĉirkaŭpafadas la manĝejon de geedzoj Szenczi.

„Ĉu la vertiĝo ĉesis? " – demandis Káldi kaj etendis manon al ŝi. „Iome mi sentas ankoraŭ ĝin" – respondis Etel. Man' en mano ili iris sur la kraketanta neĝo al la pordego.

El la hungara: D-ro István Nagy

* Hungaraj faŝistoj, farintaj teroron en Hungario fine de 1944 kaj komence de 1945

Mihály Gergely

Epitafo

Vi elpaŝos el la rivero;
post vi glatiĝos la forruliĝanta akvo,
kaj plu nenio rememorigos,
ke iam ankaŭ vi estis parto
de la belegaĵoj de l' regiono.
Vi elpaŝas el la mondo,
kaj post vi fermiĝos la fluego de la vivo;
la enviciĝintoj post vi grupiĝos,
eble rigardos vin la Asocio „propra mortinto",
(se jam dumvive neniu „kompetenta"
vin rigardis la sia),
eble la centra gazeto publikigos en du linioj,
ke antaŭ la cindriĝo kiam adiaŭos vin
la familio, kelkaj viaj amikoj,
iu ankoraŭ konos vian nomon,
iu ankoraŭ citos unu el viaj pensoj,
iu ankoraŭ gardos la memoron de unu renkontiĝo,
iu ankoraŭ ekfoliumos leksikonon,
ĉar li emos scii, kiucele vi vivis,
– poste foriros ankaŭ ili,
kaj vin entombigos en si mem.

El la hungara: D-ro Miklós Fehér

Imre Szabó

Kiam

mi pensis floron,
kiam mi pensis pri vi;
mi pensis birdon,
kiam mi pensis pri vi –

mi pensas vundon,
kiam mi pensas pri vi;
mi pensas nokton,
kiam mi pensas pri vi.

Aldo de' Giorgi

Kantu, por ne ĉagreni...

La vivo? Nura iluzio
de revoj kaj pasio:

Kiel strofo la doloro,
refreno la amoro...
Do, kantu, kantu nure
por ne ploregi dure!

Unu poemo—en du tradukoj

Miklós Radnóti
(1909-1944)

Letero al la edzino

Gvatantaj, mutaj mondoj en profundo,
ululas la silent' en orelfundo,
mi krias, sed ne venas plu respondo,
Serbion svena frapis jam la fronto
kaj vi forestas. Via voĉ' traplektas
la sonĝojn kaj la koron vi direktas.
Do, mi silentas, mure ĉirkaŭzumas,
filikoj friskaj palpe min ventumas.

Ĉu vin mi vidos? – mi ne scias plu jam,
vin, kiu estis psalme firma ĉiam
kaj bela kiel lumo, kiel ombro
mi trovus eĉ en blinda, muta sombro;
vi kaŝas vin pejzaĝe, al retino
vin pentras de interne mia sino;
realo estis vi, nun sonĝo nove,
en puton de la bubo-aĝ' reŝove

turmentas min faluz': ĉu vi min amas?,
ĉu ni sur junaĝ-pinto iam samas
en vorto fura? – mi esperas nove,
kaj sur la vojon de l' real' retrove
mi scias, ke nin fur' jam ligas. Estas
vi mia. Nur en foro. Disarestas
nin tri landlimoj krudaj. Jam aŭtunas.
Pri kisoj la memor' pli akre lumas;

miraklojn kredis mi, kaj ili pasis,
ĉiele fus bombmaŝin' amasis,
kie mi vian okulbluon miris,
sed ĝi nubiĝis kaj bombar' deziris
subfali. Jen mi vivas kontraŭ ili,
kaj sklave. Ĉion por saviĝ' aspiri
mi pesis. Tamen vin mi certas trovi;
mi migris tra anim' laŭlonge por vi,

tra landoj; sur purpure ardaj valoj,
kaj se necese, eĉ tra flamo-faloj
min mi traŝtelos, tamen mi revenos;
kiel krust', se necese, min mi tenos;
pli forta ol armiloj kaj potenco:
trankvilo de virar' en danĝer-denso
pacigas min, per friska ondo volvas,
realo de l' 2x2 min kovras.

Lager Heidenau, en la montaro super
Žagubica, aŭgusto-septembro 1944.

El la hungara: imre *Szabó*

Miklós Radnóti
(1909-1944)

Letero al mia edzino

Misteraj, mutaj floroj en la valo.
Ululas la silent' en mia menŝĝangalo.
Mi krias vane, surde – sen respondo:
Serbio kuŝas svene. El la fora mondo
jen via voĉ' traplektas sonĝon mian,
kaj venas tag', sed ĝin mi aŭdas ĉiam.
Silenton do, dum ĉirkaŭ mi ekzumas
filikoj altfieraj kaj min alpalpumas.

Ho, kiam povos vin mi vidi nove?
Vin, kiu firma estis psalme, ĉiopove,
kaj bela kiel lumo, kiel ombro bela.
Eĉ mute vin mi trovus, eĉ en blind' malhela.
Vi kaŝas vin ĉi tie. Al okuloj – por mi
vi ŝvebas elen, mens' vin povas formi.
Vi estis vero, sed nun revo sankta.
En puton de l' bub-aĝo refalanta,

ĵaluza mi postulas amkonfeson,
vi donu kiel iam la promeson
per ligo nia. Brilas amespero,
oscedas ree puto de la vero:
mi scias, ke vi jam edzino estas;
landlimoj tri sovaĝaj tamen disarestas.
Aŭtunas jam. Ĉu velk' min plu katenos?
Pri kisoj niaj bild', pli akra, venos.

Miraklojn kredis mi, sed estis jam delonge;
grenadmaŝinoj vicas alte kaj oblonge.
Okulobluon vian tie mi admiris,
sed bombflugantoj ĝin en nigran nubon tiris –
atakopretaj. Sed mi tamen spiras.
Kaptit' mi estas; kion mi aspiras,
mi juĝas sobre. Tamen foj' post fojo
mi marŝas sur l' anima longa vojo;

mi migris landojn en ardaĵ' purpura,
se devos, min mi sorĉos trans la nura
flamar' por spiti ĉion, hejmen veni,
mi povos kiel krusto min alkroĉe teni.
Valora, pli ol armilar', potenco,
la mut' de viroj krudaj en danĝerodenso
trankvilon donas al mi. Kvazaŭ nokta flu' –
envolvas min la sobro de l' duobla du.

Lager Heidenau, en la montaro super
Žagubica, aŭgusto-septembro 1944.

El la hungara: Ferenc *Szilágyi*

Szilárd Bálint

LA MALFACILA DECIDO

Sub ĉielo serena, sed sur koto terena malrapide paŝis du viroj.

– Haltu frateto! – ekparolis la pli maljuna.

– Kion vi volas?

– Nur la duonon de la heredaĵo post niaj gepatroj...

– Nur tion? Vi scias, ke niaj gepatroj vendis nian bienon dum ili ankoraŭ vivis.

– Sed restis la domo!

– Tamen ĝi estis oficiale donacita al mi, kiam la bieno estis vendita!

– Sed mi havas rajton pri ĝi! Kiam vi estis infaneto, mi multe laboris anstataŭ vi, bone komprenu!

– Kaj kiam vi iĝis 25-jara, vi forlasis niajn gepatrojn, edziĝis aliloke... de post tiam zorgis pri ili mi!

– Ne disputu! Pagu al mi la duonon de ĝia valoro, 200 mil forintojn.

– Nu, atendu tion ĝis Sankta Neniamo – eĉ unu forinton mi ne pagos!

Koleraj krioj kaj blasfemoj sekvis, eĉ interlukto. La juna frato ricevis tranĉilpikon en la ventron...

En la hospitalo nokte deĵoris Elizabeta, ĵus diplomita kuracistino, kiam alvenis la savaŭto kun la grave vundita junulo. La deĵoranta kirurgo vokis ŝin en la operaciejon kaj incitite montris sian dekstran brakon al ŝi. – Rigardu, kian malbonŝancon mi havas – li diris – antaŭ horo brulvundiĝis mia mano... Mi ne kapablas operacii, kvankam tiu junulo troviĝas en tre danĝera stato. Ne estas tempo atendi. Vi devos lin operacii!

– Sed mi ne estas kirurgo – hezitis Elizabeta.

– Faru tamen tute trankvile, mi klarigos ĉion al vi! Spertaj flegistinoj helpos nin...

La operacio sukcesis glate, dank' al la mana lerteco de Elizabeta. Sed alitage la ĉefkuracisto eksciis el la taglibro, ke ŝi faris la operacion, ŝi, la sensperta kolegino.

– De kie vi prenis la kuraĝon operacii? Ĉu la fraŭlineto emas ludi per la homa vivo? – demandis kolere la ĉefkuracisto.

– Ne, ne estis ludo... sed savo de homa vivo.

– Vere, sen ŝia helpo ne eblis savi la junulon – montris sian brulvunditan manon la kirurgo.

– Mi ne povas permesi tian aventuradon! Ŝajne, kolegino, vi ne estas sufiĉe okupita. De nun vi laboros en la elektroterapiejo, krome dufoje semajne vi deĵoros nokte por akiri pli da sperto...

Ĉe la elektraj aparatoj Elizabeta havis abunde da taskoj. Vespere jam lace ŝi enlitiĝis en sia modesta luita ĉambro, kaj entuziasme studis el medicinaj faklibroj, ĝis ili falis el ŝiaj manoj.

Iutage ŝi vizitis la operaciitan junulon por kontroli lian saniĝon. Tiam la junulo konfesis al ŝi pri la motivoj de la afero:

– Kiam mia patro vendis la bienon, li donis la duonon de la ricevita mono al mia frato. El tio li konstruis por si belan domon, kaj mi ricevis la gepatran domon. Baldaŭ mi iĝis seruristo, kaj kiel metiisto mi zorgis pri la maljunaj gepatroj. Kaj mia frato nun ekpostulis la duonon de mia domo... kompreneble mi rifuzis... do tiel okazis ke li pikis min...

En la hospitalo komenciĝis – kaj ekstere daŭris – pli kaj pli intima amikeco inter Elizabeta kaj Johano, la kirurgo, kiun afliktis la koleriĝo de la ĉefkuracisto, kiam ŝi helpeme faris anstataŭadon ĉe la operacio.

Post kiam Petro resaniĝis, li foje invitis Elizabetan viziti lin. Elizabeta rimarkis belan ordon inter la maŝinoj en la metiejo kaj plaĉan, puran hejmon en la loĝejo. Kaj ŝi ne povis ne demandi de Petro:

– Tamen mankas la spuroj de virina mano... kial vi ne edziĝis?

– Ĉar ĝis nun mi ne renkontis la konvenan virinon...

Elizabeta trovis lin vere simpatia viro, kaj post iom da tempo ŝi ne rifuzis inviton de Petro ekskursi per lia aŭto al la lago Balatono, ankaŭ al aliaj vizitindaj lokoj. Alifoje ŝi volonte renkontiĝis kun Johano, plej ofte en ĉarma sukeraĵejo ili babiladis, kaj se eblis, ili ankaŭ dancis tie.

En la hospitalon venis aliaj novuloj el la universitato. La diligenta Elizabeta povis baldaŭ forlasi la elektroterapiejon kaj reiri al la interna medicino, al sia vera fako. Laŭ komisio de la repaciĝinta ĉefkuracisto ŝi plenumis sciencajn observojn, tiel eminente, ke ŝi meritis eĉ gravajn laŭdojn de la superaj instancoj.

Elizabeta ofte diris, ke ŝi havas du bonajn amikojn, „fratojn", kaj ili triope veturas ekskursi kaj al teatroj. Venis la tempo, kiam la – jam interamikiĝintaj – viroj ekdeziris fianĉinigi ŝin. Unue Johano petis ŝian manon, emfazante la interligon de la sama profesio krom sian sinceran amon.

– Mi devas bone pripensi tion... – respondis Elizabeta.

Post kelkaj tagoj Petro komencis konfeson:

– Iam vi demandis min, kial mi ne edziĝis? Mi respondis, ke mi atendas la konvenan virinon. Mi trovis ŝin, tiun, kiu savis mian vivon, kiu signifas por mi la harmonion en la vivo. Mi ofertas al vi miajn laboremajn manojn...

– Mi devas bone pripensi tion... – respondis Elizabeta.

Elizabeta longe hezitis, Sed dumtempe okazis io...

* * * *

Kara Leganto! La redakcio ne konas la eventon, kiu sekvis. Tial ni petas vian helpon. La plej bona solvo ricevos libropremion, kaj la teksto (ne pli ol 30 tajpitaj linioj) aperos en H.V.
Limdato: unu monato post la alveno de tiu ĉi numero.

Respondo el Britujo

En la ĉijara dua numero de HV ni raportis pri tio, ke en la numero 1984/1 la hungarlingva revuo de HEA „Világ és Nyelv" aperigis „Malfermitan Leteron al la Brita Ĉefministro Margaret Thatcher". La gazetara oficejo de la brita ĉefministro respondis tiun ĉi malfermitan leteron fine de junio. Ni aperigas ĉi tie la originalon de tiu ĉi letero kun ĝia Esperanta traduko. Por komprenigi ĉiujn cirkonstancojn, skize ni ripetas, kiel naskiĝis la malfermita letero.

La numero de „Világ és Nyelv" kun la malfermita letero aperis – komence de februaro – en la unua tago de la Budapeŝta vizito de la brita ĉefministro. Ekzempleron de tiu numero kun anglalingva traduko de la malfermita letero ni transdonis al gazetara sekcio de la Brita Ambasado en Budapeŝto, kiu siavice transdonis la dokumentojn al la brita ĉefministro.

La iniciato pri tiu ĉi malfermita letero venis de David Curtis, samlandano de Margaret Thatcher, aktivulo de la brita Esperanto-movado. En sia letero li informis d-ron István Szerdahelyi, fakestron de Esperanto ĉe la Budapeŝta Universitato „Eötvös Loránd" pri tio, ke sinjorino Thatcher en televida intervjuo je la demando „Kio estas via plej granda deziro? " respondis jene: „Mi volus scii naŭ fremdajn lingvojn, por ke mi povu senpere interkompreniĝi kun ĉiuj miaj partneroj en la Eŭropa Komunumo. Kiam mi estis juna, mi aŭdis pri la internacia lingvo Esperanto, sed bedaŭrinde ĝi ne sukcesis. Ĝi estus tre necesa, tial mi tre bedaŭras, ke okazis tiel."

David Curtis rekomendis, ke iel ni profitu la Hungarlandan viziton de la brita ĉefministro, por ke ŝi povu konatiĝi ankaŭ kun la opinio de ne-britaj fakuloj pri tiu ĉi temo. Tiam decidis la redakta komitato de „Világ és Nyelv" adresi malfermitan leteron al Margaret Thatcher. La malfermitan leteron subskribis: d-ro János Balázs kaj d-ro László Deme, lingvistoj, universitataj profesoroj, Gyula Fekete kaj Mihály Gergely, verkistoj, András Sugár, ĉefkunlaboranto de la Hungara Televido, kaj la aŭtoro de ĉi tiu artikolo.

Multaj legantoj de „Világ és Nyelv" trovis la iniciaton tre bona, aprobis la argumentojn de la malfermita letero, kiu notis la pozitivajn elementojn de la vortoj de la brita ĉefministro, atentigis pri la eraro koncerne la „nesukceson" de Esperanto, kaj alvokis ŝian atenton pri la pozitiva sinteno de multaj – interalie britaj – lingvistoj. La malfermita letero memorigis ankaŭ pri tio, ke en la brita parlamento funkcias „Esperanto-lobby" kun 153 membroj.

Ne estis malfacile antaŭvidi tion, kio konceptiĝis jene en la malfermita letero: „Ni ne havos iluziojn koncerne la efikon de nia malfermita letero." Tamen, la ricevita respondo pruvas, ke estis inde publikigi la malfermitan leteron. Dankon pro la korekte sincera, ĝentila respondo, kaj ni esperas, ke estas vere tiel, kiel legiĝas en ĝi: „Kun interesiĝo ni legis kaj studis vian malfermitan leteron..."

Ĝuste tial estus tre bone, se s-ro Iain R. Murray, la respondanta kunlaboranto de la Gazetara Oficejo diskutus kun la argumentoj de la malfermita letero, provus refuti ilin, trovi kontraŭdirojn inter ili, kiel faris la malfermita letero, atentigante pri kontraŭdiroj rimarkeblaj en la vortoj de la brita ĉefministro.

Nu, ni komprenas: la brita ĉefministro kaj ŝia gazetara oficejo ne havas tempon polemiki kun la hungara malfermita letero. Sed ni ne povas ne memori la vortojn de la kunlaboranto

DAŬRIGO
de la novelo
«La kukolido»

aperinta en la numero 1984/1

Daŭrigas: William Auld, el Dollar (Skotlando)

Eva kaj la edzo longe rigardis sin reciproke. Finfine ŝi diris: Nu, kio nun? Ŝakpato, por tiel sin esprimi?

Malrapide li trapaŝis la salonon, ĝis la fenestro. Apenaŭ ŝi ekaŭdis la murmuritan frazon: Filon mi tiom volis havi... Kaj jam neeble. Turninte sin, li daŭrigis emfaze: Mi postulos en juĝejo kuratorecon de nia bebo!

– La patro vi ne estas. Sekve neniun rajton vi havas.

La edzo palpe trovis seĝon, sidiĝis, kaj kaŝis la vizaĝon per la manoj. Sekvis alia longa silento. Poste Eva ekparolis heziteme. – Al mi ne plaĉas, ke la bebo estu senpatra. Tio estas nenatura...

– Edzigu vian amaton! – li ĵetis al ŝi.

Trankvile ŝi respondis: Mi lin ne amas, fakte neniam amis. Tion mi tre klare diris al li, cetere. Efektive, mi ĉiam ĝis nun kredis, ke la amo estas nenio alia ol iluzio. Tamen nun...

– Nun? – li rigardis ŝin per okuloj senesprimaj.

– Mi emas konsenti kun tiu franco, kiu diris, ke la amo estas tio, kion oni traspertis kune. Ŝajnas al mi, ke vi kaj mi iom multe traspertis. Kion vi opinias? Ĉu eble ni povus konstrui vivon... triope? Mi sentas, ke la spertoj serioze maturigis min. Mi povas esti al vi lojala edzino. Kaj mi scias, ke vi patre amos... nian filon. Kara?

La edzo stariĝis.

– Mi volas provi, li diris.

10 DOWNING STREET

29 June 1984

Dear Mr. Imre,

The Prime Minister has asked me to reply to your letter, and its enclosed open letter on the subject of Esperanto. I must apologise for the delay.

We have read and considered your open letter with interest, and we wish you, and all associated with "World and Language" well in your efforts to promote the wider usage of Esperanto. Clearly an internationally agreed common language might have a number of advantages for fostering mutual understanding among the countries of the world, but we believe that it would be very difficult to consider it as a practical proposition. It is the Policy of Her Majesty's Government to promote the use of English as an international language, and indeed it is recognised as such by a large number of international organisations.

Thank you for bringing this interesting subject to our attention.

Yours —

IAIN R MURRAY
PRESS OFFICE

Imre Szenes Esq
Editor-in-Chief
World and Language
Vilag Nyalv

Kara Sinjoro Imre!

La Ĉefministro min petis respondi vian malfermitan leteron, kiu temis pri Esperanto. Mi devas peti pardonon pro la prokrasto.

Kun interesiĝo ni legis kaj studis vian malfermitan leteron, kaj ni deziras sukcesojn al vi kaj al ĉiuj tiuj, kiuj grupiĝis ĉirkaŭ „Mondo kaj Lingvo" en la klopodoj por la plivastigo de la uzado de Esperanto. Estas klare, ke internacie akceptita komuna lingvo havus multnombrajn avantaĝojn por akceli la interkompreniĝon inter la landoj de la mondo, sed ni trovas, ke estus tre malfacile konsideri ĝin kiel praktikan proponon. La politiko de la Registaro de Ŝia Reĝa Moŝto estas akceli la uzon de la angla kiel internacia lingvo, ĉar fakte ĝi estas rekonita kiel tia en multaj internaciaj organizaĵoj.

Ni dankas, ke vi rekomendis tiun ĉi interesan temon por nia atento.

Iain R. Murray
Gazetara Oficejo

Al Imre Szenes
Ĉefredaktoro de
Mondo kaj Lingvo
Világ és Nyelv

de la gazetara sekcio de la Brita Ambasado en Budapeŝto, kiu diris leginte la malfermitan leteron: „Tiu ĉi letero argumentas tiel bone, ke estos malfacile diskuti kun ĝi..."

Estu kiel ajn, ni ne povas ne fari kelkajn komentojn pri la respondletero:

1. Se la subskribinto rekonas, ke internacie akceptita komuna lingvo havus multajn avantaĝojn, kial oni pensas, ke estus malfacile konsideri ĝin kiel praktikan proponon? Ja se la brita registaro estus inter la iniciatantoj de tia internacia interkonsento, per tio ĝi demonstrus tian altruismon, profundan respekton al la universalaj interesoj de la homaro, ke tio jam per si mem konvinkus la plimulton de la neanglalingvaj ŝtatoj pri la graveco de internacia akcepto kaj enkonduko de komuna lingvo.

2. Sed la letero de la gazetara oficejo, prezentanta la opinion de la brita ĉefministro, donas sinceran respondon pri tio, kial ne eblas konsideri la proponon pri la komuna lingvo. Tial, ĉar „la politiko de la Registaro de Ŝia Reĝa Moŝto estas akceli la uzon de la angla kiel internacia lingvo, ĉar fakte ĝi estas rekonita kiel tia en multaj internaciaj organizaĵoj." Sed tiu ĉi lasta aserto ne estas tute ĝusta. Eĉ ne tiam, se estas vere, ke la internacie plej multe uzata lingvo estas la angla. UN havas ses oficialajn lingvojn, UNESKO kaj la Eŭropa Komunumo eĉ pli, kaj apenaŭ ekzistas internacia organizaĵo, kies membroj estus akceptintaj, ke la sola uzata lingvo estu la angla. Kaj la „politiko de la Registaro de Ŝia Reĝa Moŝto" volas atingi ĝuste tion. Tiu ĉi politiko estas malkaŝa konfeso pri la ekzisto kaj celo de la angla lingva imperiismo.

Kaj se la angla estas rekonita kiel internacia lingvo en multaj internaciaj organizaĵoj – kiel diras la respondletero – kial estas la plej granda deziro de la brita ĉefministro scii naŭ fremdajn lingvojn? Evidente tial, ĉar laŭ UN statistikoj nur ĉ. 12% de la tutmonda loĝantaro parolas la anglan – kaj tiu ĉi cifero inkluzivas ankaŭ tiujn personojn, kiuj parolas ĝin kiel fremdan lingvon.

4. Nur unu rimarkon ankoraŭ pri „la politiko de la Registaro de Ŝia Reĝa Moŝto": kio okazus, se ankaŭ la francoj, hispanoj kaj germanoj volus akceptigi sian lingvon kiel internacian, ja ankaŭ la lingvoj de la menciitaj popoloj estas oficiala lingvo en pluraj landoj.

Pri la respondletero, koniganta la starpunkton de la brita ĉefministro, resume ni povas diri: dankon pro ĝi, ĉar eĉ senvole ĝi demonstas la ĝustecon de la starpunkto de la internacia Esperanto-movado.

Imre *Szenes*

GVIDLIBRO PRI MONDLINGVAJ PROBLEMOJ



Dum la somero aperis tre interesa, preskaŭ 500-paĝa hungarlingva libro ĉe la Budapeŝta Eldonejo „Gondolat", en la serio „Pro és kontra" (Por kaj kontraŭ), sub la titolo „A világnyelv" (La mondlingvo). Ĝi estas speco de lingvistika antologio pri mondlingvaj problemoj, citanta la opiniojn de tiu malpli ol trideko da vere signifaj lingvistoj, kiuj donis atenton al la problemoj de la internacia lingva situacio kaj al tiuj de artefaritaj lingvoj. La redaktoro László *Antal*, konata hungara lingvisto, dividas la vastan problemaron je naŭ temoj, vicigas la opiniojn, esprimitajn de diversaj lingvistoj, kaj ofte ankaŭ li mem komentas ilin, ĉu aprobe, ĉu kritike. Li klopodas doni objektivan bildon pri la sinteno de la lingvoscienco al la demando pri la ebleco utiligi artefaritan lingvon, tamen el liaj komentoj klare evidentiĝas, ke li jesas tiun eblecon. (Estas menciinde, ke unu el la reviziintoj de la manuskripto estis d-ro István Szerdahelyi.)

Tiu ĉi verko de Antal meritas nepran atenton de la Esperanto-movado, eĉ se li havas rezervojn koncerne Esperanton. Ni rekomendas al niaj legantoj voki la atenton de la sialandaj eldonejoj pri tiu ĉi libro, kies precizaj bibliografiaj indikoj estas la jenaj:

A világnyelv. Pro és kontra. Válogatta és szerkesztette Antal László. Gondolat, Budapest, 1984. 481 p. ISBN 963 281 319 7. Ĉisube ni provas koncize prezenti la strukturon de la libro.

1. Bezono de internacia peranta lingvo – malnovaj perantaj lingvoj. En tiu ĉi ĉapitro la redaktoro prezentas citaĵojn el la verkoj de Karl Brugmann kaj Gustav Meyer, kiuj neis la bezonon de internacia peranta lingvo, kaj tiujn de Otto Jespersen kaj Edward Sapir, laŭ kiuj la homaro bezonas tian lingvon. La opiniojn sekvas superrigardo pri la lingvoj de la mondo: ties multeco en si mem estas pledo por internacia lingvo. La ĉapitron fermas konciza historia prezento pri tio, kiuj lingvoj en diversaj epokoj plenumis tiun rolon.

2. Ĉu iu el la naturaj lingvoj? Brugmann respondas nee, ĉar oni ne venus al konsento, kiu lingvo havu tiun rolon. Jespersen opinias, ke necesas neŭtrala lingvo. Stanley Rundle pruvas, ke neniu el la tn. „grandaj lingvoj" taŭgus ideale por la celo. Sapir atentigas, ke la naciaj lingvoj pro historiaj kaŭzoj estas rigidaj. Robertson kaj Cassidy trovas, ke la rolon de la internacia lingvo plenumos ĉu la angla, ĉu iu artefarita lingvo, aldonante, ke la elekto de internacia lingvo okazos ne laŭ lingvaj kriterioj, sed laŭ tio, ĉu en la mondo kreskos aŭ malkreskos la influo de tiuj, kiuj parolas la anglan. Analizante la anglan, Sapir konstatas, ke la simpla morfologio faciligas la lernadon nur komence, kaj por tiu facileco kare oni pagas poste. Ankaŭ E.Svadost argumentas kontraŭ la angla, laŭ lingvaj kaj sociaj kriterioj.

En aparta ĉapitro Antal prezentas kaj kritikas la metalingvistikajn tezojn de B.L. Whorf, laŭ kiu la lingvo determinas la manieron, per kiu ni vidas la mondon. Antal trovas, ke praktike ne estas tiel, ja malgraŭ ĉia diverseco oni povas krei uzeblajn dulingvajn vortarojn.

Estas lanĉita ankaŭ la ideo pri la revivigo de la latina lingvo – ties eblon Jespersen refutas tre faksperte.

3. Miksitaj lingvoj. En la enkonduko Antal sprite kaj elegante demonstras, ke praktike ĉiuj lingvoj estas iagrade miksitaj. Pro la fakto, ke iuj teorioj imagas la kreiĝon de la unueca lingvo de la mondo per la kunfandiĝo de la ekzistantaj miksitaj lingvoj (piĝinoj), per citaĵoj el la verkoj de Robert Hall kaj J. Vendrynes.

4. Konscia formado de naturaj lingvoj. Viciĝas la opinioj de Karl Brugmann, Hugo Schuchardt, Baudouin de Courtenay, Ferdinand de Saussure, Otto Jespersen kaj Valter Tauli. La plimulto jesas tiun eblon surbaze de la historiaj spertoj, nur Saussure – surprize – esprimas siajn rezervojn. Surprize, ĉar estis ĝuste li, kiu demonstris la arbitran karakteron de la lingvaj signoj, kaj, oni pensus, se la lingva materialo estas arbitra, do necesas nur socia interkonsento por ŝanĝi ĝin parte aŭ tute. Sed Saussure argumentas tiel, ke pri logike alireblaj demandoj oni povas diskuti, kaj ŝanĝi la jam ekzis-

tantan je io nova, se tio estas pli bona; la arbitra lingva signo ne estas alirebla logike, do konscie ĝi ne ŝanĝeblas. La logiko de Saussure estas senerara, tamen la praktiko en tiu ĉi kazo ŝajne kontraŭstaras la teorian logikon: ekz. en la hungara lingvo inter 1950 kaj 1960 komplete oni sukcesis hungarigi la futbalterminaron – la malnovajn, fremdajn terminojn jam konas nur aĝaj homoj, sed eĉ tiuj ne uzas ilin!

Grava konstato de Jespersen aperas en tiu ĉi ĉapitro: li demonstras, ke inter la naturaj kaj artefaritaj lingvoj ekzistas ne kvalita diferenco, sed nur laŭgrada: en ambaŭ specoj de lingvoj troviĝas kaj naturaj, kaj artefaritaj elementoj. Pli frue ankaŭ Schuchardt esprimis la saman opinion.

La ĉapitron fermas la pensoj de Tauli pri la lingva planado. Li energie refutas la nesciencajn, mistikajn konceptojn pri la lingvo.

5. Ĉu la artefarita lingvo estas homunkulo? („Homunkulo" estas simbolo de la nenatureco.) La ĉapitron malfermas citaĵo de Schuchardt, kiu diras interalie: *„Artefarita lingvo estas esprimo ne sensenca, plie taŭtologia: envere ĝi signifas lingvoteknikon ellaboritan plene konscie..."* Poste sekvas lia diskuto kun Meyer, kiu lasta, tre romantike, rigardas la lingvon io simila al la biologia viva organismo. Schuchardt sprite triumfas en la diskuto.

Brugmann argumentas kontraŭ la artefaritaj lingvoj, sed pli lerte, ol Meyer. Teorie li ne ekskludas la eblon internacie ekuzi artefaritan lingvon, sed li vidas nevenkeblajn praktikajn problemojn. Baudouin de Courtenay konstatas: *„Ĉiu lingvo estas „morta" por ni, ĝis ni alproprigas ĝin, kaj ĉiu lingvo fariĝas ‚viva', se ni enigis ĝin en nian kapon."* Jespersen kaj André Martinet same refutas la sentimentalan, romantikan traktadon de la homa lingvo.

6. Kia estu la strukturo de la artefarita lingvo? La ĉapitro komenciĝas per citaĵo de Tauli; li skizas la „lingvan idealon". Li mem devas konfesi, ke la realigo de ĉiuj pretendoj ne eblas, ĉar pluraj el la pretendoj reciproke ekskludas unu la alian. Sapir substrekas, ke la internacia helpa lingvo devas esti totala, ĝi devas esprimi ĉiujn manifestiĝojn de la homa spirito. Martinet analizas la praktikajn problemojn de la kreado de artefarita lingvo.

August Leskien alfrontas la problemon ne ĝenerale, li metas sub sian lupeon Esperanton. Li akre kritikas la Esperantan sonsistemon, nome la troan riĉecon de la konsonantaro, kaj la oftecon de certaj sonkombinoj. En sia respondo Baudouin de Courtenay atentigas, ke la akcepto de la Leskien-aj kriterioj kondukus al tio, ke la artefarita lingvo povus uzi nur sep konsonantojn, kaj tiamaniere elfermiĝus el la lingvo aro da internaciaj vortradikoj.

N.S. Trubetzkoy, la patro de la moderna fonologio same okupiĝas pri la ideala sonsistemo de la artefarita lingvo. Li trovas akceptindaj naŭ konsonantojn. La akcepto de liaj kriterioj do same eliminus el la lingvo multajn internaciajn radikojn.

Jespersen kritikas la Esperantajn supersignojn, la apriorecon de la tabelvortoj, la akuzativon, la radikkarakteron ktp.

Géza Bárczi substrekas la logikecon de Esperanto.

La ĉapitron fermas du citaĵoj de Max Mangold: en la unua li argumentas, ke ĉe la konstruado de artefarita lingvo oni devas doni atenton al tio, ke ĝi estu facile rekonebla fare de maŝino. En la dua li atentigas, ke lingvo kun tre malmultaj fonemoj estas facile parolebla, sed malfacile komprenebla. Li trovas, ke la optimumo estas 20-30 fonemoj.

7. Teorioj pri la formiĝo de la estonta mondlingvo. Sapir trovas, ke por la mondlingva rolo havas ŝancon ia simpliĝinta formo de la angla, aŭ iu artefarita lingvo. Laŭ li, la simpliĝinta angla ne povos kontentigi ĉiujn bezonojn, do iom post iom okupos ĝian rolon artefarita lingvo.

Meyer opinias, ke la mondlingvan rolon havos la venkinto de la konkurado inter la angla kaj la rusa.

Brugmann rekomendas al la adeptoj de la artefaritaj lingvoj modestecon – oni klopodu enkonduki ĝin nur iom post iom. En la sekva komentario de Antal ni povas legi konsternan konstaton: li trovas neebla la disvastigon de la artefarita lingvo pere de la lerneja instruado, ĉar tio ordinare estas senefika.

Sekvas du citaĵoj de Stalin, kiu opiniis, ke la monda lingvo kreiĝos per la kunfandiĝo de la ekzistantaj lingvoj.

Svadost praktike ŝovas la demandon al la fora estonto.

Magomet Isaev pledas por la iom-post-ioma enkonduko de Esperanto.

8. Bone – sed kio okazos al la artefarita lingvo poste? Brugmann opinias, ke ĝi perdos sian unuecon, se ne estos almenaŭ unu homa komunumo, kiu uzos ĝin ekskluzive. Baudouin de Courtenay refutas tion, dirante, ke la lingvo havos sian hejmon en la kapo de la homoj, kiuj parolas ĝin. En sia komentario Antal iom nuancigite akceptas la opinion de Brugmann, tamen li ne pretendas ekskluzivan uzadon, nur ke ĝi fariĝu natura lingvo en iu komunumo. Ni povas diri, ke la Esperanto-komunumo pli-malpli kontentigas tiun pretendon – tion pruvas ankaŭ la grava reduktiĝo de la rolo de la Akademio de Esperanto: la lingvon jam de pluraj jardekoj konservas ne la Akademio, sed la uzantoj.

Jespersen demonstras, ke nuntempe ĉiu lingvo unueciĝas, ne diferenciĝas.

9. El la historio de la artefaritaj lingvoj. Ampleksa prezento per ĉerpaĵoj el la verkoj de Svadost kaj Alessandro Bausani. Laŭ la konkludo nuntempe ekzistas du vivkapablaj artefaritaj lingvoj, Esperanto kaj Interlingua.

Antal fermas la volumon per la jenaj vortoj: „...Nia celo ne estis prilabori la vastan problemaron de la artefaritaj lingvoj kaj de la mondlingvaj movadoj, sed prezenti la interrilatojn de la lingvoscienco kaj la internaciaj lingvoj (precipe la artefaritaj lingvoj) pere de la verkoj de kompetentaj aŭtoroj. El tiu ĉi tasko sekvas, ke ni ne povis akcepti la rolon de juĝanto en la diskuto, eĉ malpli tion de aŭguro... Se ni devus tiri unufrazan konkludon el tiu ĉi volumo, tio sonus jene: la historio ankoraŭ ne elektis el la multaj teoriaj ebloj, kaj tial evidente la diskuto ankoraŭ longe daŭros plu."

Vilmos *Benczik*

D-ro Ottó Thur kaj Gyula Gyerkó

Por kontraŭbatali katastrofan infektadon

URĜA HELPO PER MOVEBLA INSTALAĴO

En akvoduktoj kiuj provizas per akvo la loĝantaron, ekzistas reala minaco pro rompiĝoj de tuboj. Tiam preskaŭ neeviteble malpuriĝas pli-malpli granda volumeno de la akvo, kaj tiun eksterordinaran eventon – anticipi katastrofajn sekvojn – la instancoj devas plej urĝe kontraŭbatali. Tia danĝero povas okazi multloke: en la protektata ĉirkaŭaĵo de akvorezervujoj, putoj aŭ banejoj, same en sanitaraj kaj nutraĵon prilaboraj instalaĵoj. Ĉiuj ĉi estas ja facile danĝerigeblaj lokoj, kiujn tiuokaze oni devas urĝe kaj perfekte malinfekti, samkiel tio estas farata en regulaj periodoj. Kompreneble tiucele estas nepre necesa plene fidinda teknikaĵo, tia rimedo, per kiu eblas malinfekti sufiĉe rapide, ekonomie kaj ne troklorizante. Ankaŭ tiam necesas tiu rimedo, kiam la establita malinfekta sistemo pro iu ajn kaŭzo ne kapablas funkcii super la normalaj bezonoj. La samo validas eĉ pli, kiam la stabila sistemo surloke mankas, ĉar por la ĉiutaga uzado ŝajnis superflue ĝin instali por grandaj kostoj. Alivorte, en ĉiuj ĉi kazoj estas tre grave kaj praktike apliki rapide lokeblan, altkapablan, *moveblan malinfektan instalaĵon.*

Tian modernan klorizilon kreis la Danub-regiona Entrepreno pri Akvoprovizo kaj -Mastrumo en Vác, disvolvante tiun el la klorgasenigiloj de tipo ADVANCE (pr. advans), kiujn ĝi fabrikas laŭ kunlabora kontrakto kun la Usona firmao Capital Controls Company (vd. nian artikolon en HV 1984/4).

Tiu ĉi instalaĵo estas vere avantaĝe utiligebla ĉe multaj uzantoj: ĝi malinfektas kaj per klorgaso, kaj per natria-hipoklorito, personaŭto facile trenas ĝin surloken por malinfekti, kaj pro la propra benzinmotora generatoro ĝi ne dependas de la loka kurento.

Aplikebloj

El inter la kutimaj hidrologiaj aplikadoj la plej grava estas la danĝerklorizado, kiam ĝi estas aplikata por plej urĝe malinfekti en domoj aŭ instalaĵoj akvoduktaron, kondukilaron, poluciitan pro tuborompiĝo aŭ alia eksterordinara kaŭzo. La instalaĵo kapablas plenumi tiujn taskojn ĉu per la konvena premo de la akvoduktaro (fig.1), ĉu uzante sian – enkonstruitan – premaltigan pumpilon (fig.2).

Grava tasko estas senigi la akvon de basenoj kaj rezervujoj disde infektaĵoj. Ankaŭ tio estas farebla laŭ du manieroj: ĉu per la premo de sia funkciiga akvo (fig.3), ĉu per la utiligo de sia premaltiga pumpilo (fig.4). Ĉi-kaze, la instalaĵo post miksado refluigas en la basenon la akvon elsuĉitan de tie. Tre variaj estas la aplikebloj por malinfekti diversajn surfacojn, troveblajn ĉe muroj de basenoj kaj rezervujoj, en protektataj ĉirkaŭaĵoj de putoj, k.a. (fig.5 kaj 6).

Krom tiuj kutimaj hidrologiaj aplikadoj, la instalaĵo eminente taŭgas por malinfekti plankojn, murojn kaj teknologiajn instalaĵojn en uzinoj de viandaĵoj, konservaĵoj kaj fridaĵoj, memkompreneble

Kelkaj uzmanieroj



Fig.1 Malinfektado de akvodukto per premo de la duktaro



Fig.2 Malinfektado de akvodukto pere de premaltiga pumpilo



Fig.3 Malinfektado de rezervujo per premo de la alpumpita akvo

ankaŭ en internaj spacoj de agrikulturaj kaj sanitaraj establaĵoj. Por plenumi tiajn taskojn, la instalaĵo estas provizita per speciala disŝutilo, kiu forte pliigas la rezultojn. El la supre menciitaj jam videblas, ke ĝi estas tre bone utiligebla ĉe malinfektado de akvoprovizaj kaj sanitaraj establaĵoj, en provizoraj tendaroj, surlokaj pavilonoj k.s.

Ĉefaj teknikaj karakterizoj

La instalaĵo troviĝas sur postveturilo (remorko) de tipo LISZ 501, kiun povas treni personaŭto. Ĝiaj 3 partoj:

- ekipaĵo de funkciiga akvo,
- ekipaĵo por dozado de klorgaso kaj natria-hipoklorito,
- —ekipaĵo por energio-provizo.

La *ekipaĵo de funkciiga akvo* provizas per la necesa akvo la ejektoron en konvenaj premo kaj kvanto. Ĉe kontraŭpremo de 100 kPa necesas 25 l/min da akvo kaj ĉ. 350 kPa premo. Al kreskanta kontraŭpremo apartenas kreskantaj valoroj de premo kaj akvo.

La konekto al la akvoduktaro okazas ĉu senpere tra fleksebla tubo (hoso) kaj rapidŝaltilo de tipo NA 40, ĉu pere de premaltiga centrifuga-pumpilo de tipo TTM 6/10 V. Ties ĉefaj datoj:

- Akvolivero: Q = 60 l/min,
- Premalto: H = 50 m,
- Tensio de elektromotoro: 3 x 380 V,
- Energiokonsumo: 2 kW.

Por kontroli kaj reguli la funkciigan akvon, la premflanko surhavas valvon, manometron kaj rotametron. El la prembranĉo deiras kondukiloj, funkciigantaj la ejektorojn, kaj evita kondukilo. La enfluigita akvo funkciigas – depende de la valvoj sur la elira branĉo – la ejektorojn, dozantajn klorgason, resp. natria-hipokloriton; la superflua akvo preteras la ejektorojn tra evita kondukilo. Ankaŭ la kontraŭpremon mezuras manometro ĉe la postejektora tubo. La klorizita akvo estas fluigata al la uzloko tra kaŭĉuktubo firmigita per tolo.

La dozado de la klorgaso kaj natria-hipoklorito okazas per du apartaj sistemoj. Al la valvo de la surmuntita klorgasbotelo de 27 litroj konektiĝas la klorgasenigilo ADVANCE 201, kies kapacito estas inter 0,6–2000 g/h. Tiun aparaton fabrikas la Entrepreno laŭ kunlabora kontrakto kun NIKEX kaj Capital Controls Company.

1./ Movebla kloriza instalaĵo (malfermite)

La volumeno de la dozita klorgaso estas regulebla permane sur la aparato kaj kontrolebla per rotametro. La dozigilo estas vakusistema, kiu okaze de difekto ĉe la klorgas-kondukilo, aŭtomate fermas la gaselfluon pro la ekstera premo. Do ĝi estas tute sekurigita. El la dozigilo la klorgaso fluas tra vaku-kondukilo en la ejektoron, kie la kloro miksiĝas en la akvon.

En la alia sistemo la natria-hipoklorito troviĝas en du plastaj ujoj de 20 litroj. La dozadon kaj enmiksadon ankaŭ tiurilate faras la ejektoro, kiu estas enigita en la akvocirkuladon. Por reguli kaj mezuri la dozatan kemiaĵon, ĉe ties kondukilo troviĝas almuntita rotametro kun valvo.



Fig. 4 Malinfektado de rezervujo pere de premaltiga pumpilo



Fig. 5 Malinfektado de surfacoj per premo de la duktaro



Fig. 6 Malinfektado de surfacoj pere de premaltiga pumpilo



Fig. 7 Skemo de la funkciado

1. rapidŝaltilo
2. premaltiga pumpilo
3. retroferma valvo
4. filtrilo
5. manometro
6. valvo
7. rotametro
8. ejektoro
9. ADVANCE klorizilo
10. klorgasbotelo
11. ujo de natria hipoklorito
12. konekta hoso

La energio-provizado eblas kaj de la kurenta konsumreto, kaj de la propra generatoro. La konekton al la konsumreto helpas kablon plilongiga bobeno; oni bezonas 3x380 V, 50 Hz kaj maks. 3x15 A.

2./ Movebla kloriza instalaĵo de malantaŭe, kun la klorgasenigilo



La tension indikas signallampoj sur la konekto-ŝranko. La pumpilon ekfunkciigas motorŝirma komutilo de tipo DIL 0-52; la sekurecon garantias la kurent-protekta relajso (tipo FI 40.4.–100 N-30) kun terkonektilo.

Se surloke ne ekzistas konekteblo al la konsumreto, la kurenton provizas la enkonstruita benzinmotora generatoro de tipo BA 4/2, 5-3/1. Teknikaj datoj:

energiokonsumo: 4 kW/cos =1,
– tensio: 3x380 V,
– kurentintenso: 6 A,
– povo de la benzinmotoro: 5,2 kW (3000/min),
– konsumo de brulaĵo: 2,5 l/h,

3./ La interno de la movebla kloriza instalaĵo, kun la akvoproviza ekipaĵo





Fig.8
Eroj de la instalaĵo

– dimensioj: 675 x 470 x 505 mm
– maso: 80 kg.

Funkciigo

La funkciigo de la instalaĵo dependas de la seninfektiga tasko (ekz. ĉu premaltiga pumpilo necesas aŭ ne), ankaŭ de la energioprovizo (ĉu la pumpilon provizas konsumreto aŭ propra generatoro).

La skemon de la funkciado montras fig.7.

Kiam la instalaĵo alvenas al la laborloko, oni unue fiksas la remorkon per la apogkruroj, por poste dekroĉi la trenintan aŭton. Se premaltiga pumpilo necesas, oni elektre sekurigas la instalaĵon per terkonektilo, poste konektas ĝin al la konsumreto – aŭ ekfunkciigas la propran generatoron. La funkciigan akvon oni fluigas per flekssebla tubo (hoso) al la suĉ-aldukto. Per tri-grada krano eblas direkti, se la akvo senpere aŭ helpe de premaltiga pumpilo funkciigas la ejektoron.

La klorizita akvo estas forkondukita per hoso konektita al la prem-eldukto.

Post uzo de la prembutono sur la elektra ŝranko, la kurento ekcirkulas en la instalaĵo: pere de motorprotekta magnetkuplilo la pumpilon eblas ekfunkciigi. La akvoliveron de la pumpilo oni regulas per valvo sur la premflanko, konforme al la indikoj de la manometro kaj rotametro. El inter la fermaj valvoj antaŭ la ejektoroj, restos ĉiam malfermita tiu de la dozata kemiaĵo (klorgaso aŭ natria-hipoklorito). Per la valvo de la evita kondukilo oni regulas la funkciigan akvon por la ejektoro.

Post malfermo de la klorbotela valvo, la klorgaso enfluas en la aparaton ADVANCE, kies regbutono ebligas ĝustigi la konvenan dozon.

Se oni malinfektas per natria-hipoklorito, la dozadon ĝustigas rotametro per valvo.

Pro la precizaj mezurado kaj regulado koncerne la volumenon de la funkciiga akvo kaj la natria-hipoklorito, la uzanto povas ĝustigi la deziratan kondensecon de la malinfekta likvaĵo.

Fig.8 montras la erojn de la instalaĵo:

1	suĉ-aldukto
2, 3	direkta valvo
4	rotametro de akvo
5	globvalvo
6, 7, 8	reguliga valvo
9, 10	manometro
13	ferma valvo
14	valvo de klorbotelo
15	klorfluon reganta valvo
16	globkrano
17	rotametro de NaOCl
18	prem-eldukto

La instalaĵon – fabrikitan de la Entrepreno – eksportas NIKEX Pezindustria Entrepreno pri Ekstera Komerco (H-1016 Budapest, Mészáros u. 48-54.).

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

PANORAMO



Luterana kunveno

Fine de julio kaj komence de aŭgusto en la Sporthalo „Budapest" (kie okazis ankaŭ la 68-a UK) okazis la 7-a Granda Kunveno de la Monda Asocio de Luteranoj: tiu ĉi religia organizaĵo la unuan fojon okazigis sian mondan kunvenon en socialisma lando.

La Grandan Kunvenon partoprenis delegitoj el pli ol cent landoj: ili reprezentis 55 milionojn da personoj. La kunvenintaj delegitoj elektis ankaŭ novan prezidanton por sia organizo, d-ron Zoltán Káldy, episkopon de la hungara luterana eklezio.

La 7-a Granda Kunveno formulis ankaŭ mesaĝon al la luteranoj de la mondo, instigante ilin labori por la homaj rajtoj, por la libereco esprimi la propran opinion, por la bonstato de la tuta mondo, kaj por la firmigo de la espero pri paco.



Monda ĉampionado de ĉaristoj

Meze de aŭgusto okazis la monda ĉampionado de ĉaristoj en Szilvásvárad, eble la plej pitoreska regiono de Hungario. (Szilvásvárad situas en la nord-orienta montara regiono de nia lando.) La atentindan eventon partoprenis ankaŭ princo Filipo, la edzo de la reĝino de Granda Britio. La hungaraj ĉaristoj atingis konsiderindajn rezultojn en la konkursoj: tio pruvas ne nur ilian lertecon, sed ankaŭ la altan nivelon de la hungara ĉevalbredado.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Hotel Hungaria – en Vieno

Dum la somero estis malfermita nova hotelo en Vieno, kun la nomo „Hotel Hungaria”. La novan hotelon funkciigas la hungara turisma firmao „HungarHotels”. La Viena hungara hotelo celas esti kvazaŭ la „vestiblo” de Hungario: krom la oferto de la ordinaraj hotelaj servoj ĝi deziras alvoki la atenton de la gastoj pri la proksimeco de Hungario kaj ĝiaj turismaj allogaĵoj.

Naturisma Asocio en Hungario

Komence de la kuranta jaro post iom kurioza gazetara diskuto fondiĝis la Hungara Naturisma Asocio: tion certe volonte legos ankaŭ tiuj eksterlandaj naturistoj, kiuj ĝis nun vane serĉis en Hungario eblon formeti la bankostumon. Ĉirkaŭ la lagoj de Délegyháza (sude de Budapeŝto) estis kreita naturisma kolonio – alia tia kolonio estas konstruata en Hódmezővásárhely.

KERIPAR ofertas la idealajn vendej-meblojn por Via vendejo

La varieblaj vendejmebloj elstare taŭgas por ĉiaj vendejoj de industriaj varoj. El la varieblaj eroj en la magazenoj kaj malgrandaj vendejoj oni povas konstrui taŭgan instalaĵon kaj por memservado, kaj por tradicistila vendado.



KARAKTERIZOJ: –vasta varieblo
–granda ŝarĝebleco
–estetika aspekto

PRODUKTAS: KERIPAR Budapest VI., Népköztársaság útja 43.

Komerca Direkcio
Budapest V., Bajcsy Zs. út 72.
T: 313-124

DISVENDAS: MÜÁRT – KERIPAR Komuna Oficejo
Budapest VII., Bajcsy Zs. út 63.

EKSPORTAS: TRANSELEKTRO

REVUO DE REVUOJ

Sorto de esperantistoj estas, ke ili devas elteni ne malofte „atakojn" – feliĉe! – pro tiu kurioza Esperanto: kio ĝi estas, kion ĝi kapablas, ĉu oni likvidos la aliajn lingvojn... kaj tiel plu, jen demandoj seriozaj, jen strangaj, vere surprizaj. Efektive ni bezonas, ke la demandoj venu: tra diskutoj diskuras niaj informoj pli efike, ni konvinkas dubantojn, rebatas misajn opiniojn. Sed trovi ĉiam ĝustan kaj taŭgan argumenton, eldiri realisman kaj konvinkan respondon, metas nin ofte antaŭ malfacilan provon. Precipe, se venas demandoj aŭ asertoj ekzemple tiaj: „lingvo sen popolo ne eblas", aŭ „ĉu povas ekzisti en Eo diversaj societaj stiloj? " kaj similaj „problemoj". Metu la manon sur vian koron, kaj vi konfesos, ke ne estas facile konvinke respondi, sufiĉe impone por la ĉeestantoj. FRANCA ESPERANTISTO (351.) en sia franclingva suplemento publikigis de *Claude Piron* tutan kajeron (elpreneblan) da pli-malpli tipaj demandoj kaj respondoj, foje kun konsiloj por la samideanoj. Kiel ajn stranga aŭ naiva ŝajnas al ni iu demando de ne-esperantisto, prefere ni preparu nin por bone argumenti kaj ne perdiĝi en fiasko... La prudenta maniero de Piron estas vere gratulinda, la respondoj estas bone funditaj, tial mi rekomendas la tekston nepre utiligi ankaŭ en aliaj gazetoj. Kaj sekvi la ekzemplon...

En la informado estas grava kampo ankaŭ la parlamenta agado, t.e. konvinki parlamentanojn pri la interlanda utilo de la Internacia Lingvo. Pri tiucela kongreso (!), kunvokita de Eŭropa Klubo en Antverpeno, raportis ESPERANTO (6.). Tie montriĝis kelkrilate la fruktoj de multaj antaŭaj fortostreĉoj. Konataj politikistoj, kandidatoj por la parlamento de la Eŭropa Ekonomia Komunumo venis el ses landoj por interparoli pri la perspektivoj kaj *konkretaj proponoj* koncerne la uzon de Eo en la politikaj medioj. Estas rimarkinde, ke la supraj agoj okazas jam sur sufiĉe alta nivelo, kaj persone kaj enhave. Profunde impresis multajn eksterulojn, ke Eo servas kiel pontlingvo en la preparata permaŝina traduksistemo – tiu ĉi funkcio kvazaŭ komplekse atestas pri la altaj kapabloj de Eo!

Ne mirinde do, ke TEKSTOPRILABORO estas la titolo de la nova kajero (aŭ numero, se oni volas) de INTERNACIA KOMPUTADO, faka revuo, eble la plej serioza kaj ampleksa, kiu iam aperis en E-ujo. Temas pri ne tre konataj aplikadoj de komputiloj: redaktado de tekstoj, statistikado de lingvaj eroj kaj fenomenoj, analiza esploro de stiloj, de vorttrezoroj. Ankaŭ pri maŝina tradukado, multaj komputistoj de la mondo kontribuis per dekoj da sciencaj-fakaj studaĵoj.

Pri faka diligenteco anoncas ankaŭ, eĉ se pli modestaspekte, STOMATOLOGIA FORUMO, tiu science serioza bulteno de dentkuracistoj. Videblas, ke intereson vekantaj publikaĵoj, „konstante frapante traboras", tamen ne dentojn, sed la nur ŝajne fortan muron de l' indiferenteco. Novaj kaj fakcelaj prezentaĵoj rapide ampleksigas la rondon de la kolegoj.

La brava (kaj lingve senriproĉa) KATALUNA ESPERANTISTO (238.) instige varbas por la 20a Kataluna E-Kongreso. La bunta desegno sur la kovrilpaĝo disen „erupcias" nian lingvon el la negranda lando... Ja, la bonaj interrilaroj kun katalunaj teritorioj en Francujo certe vigligas ankaŭ tie la E-agadojn kaj lokajn bultenojn en Langvedoko kaj Rusiljono.

Estu foje menciata ankaŭ la cindrulino de la belartoj, la ekslibrisoj. Ilin desegnis la konata E-aktivulo, *Dolfa Bartoŝik*, kies manon laŭdas cetere multaj E-glumarkoj. Bedaŭrinde malofte oni ekkonas ties majstrojn, kvankam ni ŝatas glui sur poŝtaĵoj la ĉarmajn propagandilojn; redaktoroj bonvolu foje atenti ankaŭ ilin!

La E-aj landnomoj tamen kontentigaj – pruvas nia verkisto, *Edwin de Kock*, en BONA ESPERO (2.) elmontrante, ke malfacilaĵoj kreiĝas sole pro la sufikson *-ujo* anstataŭiganta *-io*. Certe redukti ĉiun geografian kazon al unu skemo alportas ĝenajn formojn; plurformeco ne indikas mankon en Eo – emfazas la Sudafrika gazeto.

Niaj legantoj eksciis jam pri la letero de la hungara MONDO KAJ LINGVO (Világ és Nyelv) al la brita ministroprezidantino pro Eo. Preskaŭ samtempe KVAKERA ESPERANTISTO (117.) publikigis la leteron de Kvakeroj al la brita reĝino pro la granda instalo de plej novaj nukleaĵ armiloj en Eŭropo. Minacas nuklea holokaŭsto, asertas la Kvakeroj kaj petas la ŝtatestrojn *eviti* militeman retorikon.

Ervin *Fenyvesi*

Csepel

RAPAL levatoro por strataj veturiloj

Tiu levatoro multe faciligas la riparadon de pezaj strataj veturiloj.

LA PARTOJ DE LA INSTALAĴO:

La stablo

Ĝi konsistas el profilŝtalo velditaj kolono kaj platformo. Du ruloj de la platformo servas la stabilecon de la instalaĵo, kaj kune kun la malantaŭa turniĝema rado ili ebligas movi ĝin.

La fork-levilo

estas farata el profilŝtalo, kaj movata helpe de la levkolono. Inter la forkoj trovas lokon la rado de la veturilo; la longo de la forko prezentas sekuran pozicion eĉ al la duoblaj malantaŭaj radoj de la veturiloj. La forko estas fiksebla en la supra mortopunkto per riglita pivoto, pro kio aparta subtena stablo ne estas necesa.

La ĉasio

enhavas 2 fiksajn radojn antaŭe kaj unu turniĝeman malantaŭe, ĉiujn kun risorta suspensio.

La helicoida movilo

Sur la malantaŭan akson eblas munti manan ĉenradon, do, eĉ se ĉesas la kurento, la instalaĵon eblas ankaŭ permane sinki.

La levkolono

Sur la interna subten-kolono glitas la ekstera levkolono. La suba parto de la levkolono etendas en la levforkan konzolon, kiu apogiĝas tie sur pivoto.

Teknikaj datoj:

Ŝarĝeblo:	6 t (de la opa stablo)
Levrapido:	0,5 m/min
Puŝlongo:	1600 mm
Premo sur grundo:	15 N/cm^2
Maso:	630 kg
Regadpupitro:	45 kg
Elektra motoro:	HZP 90C-2 tipa
Povo:	3 kW
Turn-frekvenco:	2950/min
Tensio:	3x380/220 V, 50 Hz

La levatoro por strataj veturiloj estas nur unu el la CSEPEL-fabrikaĵoj. Krom ĝi jen *niaj ĉefaj fabrikaĵoj:*

- Tubo- kaj stango-laminatoroj
- Tubo-bevelaj maŝinoj
- Ŝtalkonstruaĵoj kaj gruoj
- Maŝinelementoj de egaj dimensioj
- Spiraltubon produktantaj instalaĵoj
- Specialaj frez- kaj bormaŝinoj por atom-reaktoroj
- Prematoroj por kaŭĉuk- kaj plastofabrikoj.



Detalajn informojn volonte prezentas

je via deziro

la fabrikanto de specialaj maŝinoj:

CSEPEL MŰVEK
Egyedi Gépgyár
H–1751 Budapest, Pf. 105.
Telekso: 22–6732

LAJOS DUDÁS

Fabrikado de novtipaj termotransigiloj

Estas bone konate, ke la industrio, agrikulturo kaj multaj servoj abunde uzas por fridigo kaj hejtado lamenajn termotransigilojn, precipe radiatorojn.

Tiuj termotransigiloj – laŭ la faka termino – konsistas esence el tuboj, kondukantaj la termohavan materion, sur kiuj oni alfiksas lamenojn kiel termotransigilojn. Por certigi ties daŭran funkciadon, oni devas krei firman ligon inter la konduktubo kaj la termointerŝanĝa lameno.

Uzante ŝtalajn tubojn kaj lamenojn oni povas simple kontentigi tiun postulon: oni trempas ilin en zinkbanon. La zinko ŝirmas la struktur-elementojn kontraŭ korodo, krome fiksas la lamenojn. Se la tubo havas maldikan vandon, oni mekanike vastigas ĝin, tiel kreante ligon inter la buteo de la termotransigaj lamenoj kaj la tubo.

La fabrikantoj de la termotransigiloj jam delonge turnis sian atenton al la aluminio. Pro ĝiaj ecoj: facila prilaboro, bona termokonduktivo, korodimuneco, la aluminio estas ideala materio por fabriki termotransigajn lamenojn. Tamen, malgraŭ ĝiaj eminentaj ecoj, la aluminio ne akiris vastan uzon pro la problemoj koncerne ĝian alfiksadon.

Kiel konate, la oksidtavolo, kovranta la surfacon de la aluminio, malhelpas la metalan interligon kun aliaj materialoj. Forigi tiun oksidtavolon kaj prepari la surfacon por la metala interligo, estas tre komplika, sekve multekosta procedo.

Pro tio ne disvastiĝis la aplikado de la aluminio. Aparte malfacile estas krei firman interligon de la du metaloj, se la tubo estas dikvanda aŭ el tre solida materialo, ĉar la interna premo estas tiam tro granda.

Ankaŭ la fakuloj de nia kooperativo renkontis la supre menciitajn malfacilaĵojn, kiam ili klopodis alfiksi perfekte aluminio-lamenojn sur ŝtaltubojn. Tamen hodiaŭ ni povas jam trankvile aserti, ke ili plene solvis tiun taskon. Tiucele la ekstera surfaco de la ŝtaltubo estas kovrata per aluminio, kaj oni fiksas sur ĝin la aluminio-lamenojn.

Tiu interligo de la lamenoj montriĝis perfekta en la temperaturoj inter -60 kaj +180 °C. Korodo maleblas, ĉar ĉe la aera flanko la materio estas sole aluminio; cetere ĉe kunigo de du diversaj metaloj la korodo estus tre malfacile eliminebla. Kompreneble tiuj teknologiaj procedoj estas protektataj per patento.

Post la solvo de la alfikso kaj la senkoroda stato, oni jam povas perfektigi la disvolvon: t.e. utiligi la menciitajn gravajn rezultojn, realigante *ĉe la produktafoj* la termodinamikajn avantaĝojn de la aluminio.

Al tiu laboro aliĝis ankaŭ teknologiaj esplorinstitutoj kaj universitatoj, nome: la Katedro de Termikaj Maŝinoj en la Budapeŝta Politeknika Universitato, la Katedro de la Hidraŭlikaj kaj Termikaj Maŝinoj en la Pezindustria Teknika Universitato en Miskolc, la Departemento pri Korodo en la Projekta Instituto por Ĝenerala Maŝinfabrikado (ÁGTI) k.a.

La ĉefa celo de ilia esplorado estis: trovi optimuman solvon por la supre skizita teknologia tasko, samtempe kun malplej da elspezoj dum la fabrikado, resp. dum la uzado kie ajn. Kaj tio estis tre malfacila tasko, oni devis ja konsideri koliziajn interesojn.

Tiujn taskojn oni tamen sukcese solvis sur la ĉefaj kampoj.

– ĉe termotransigiloj, *aeraj fridigiloj*, funkciantaj sub 0 °C.

– ĉe varmotransigiloj, varmoradiiloj (radiatoroj), konvektiloj, funkciantaj super 0 °C.

Ekzamenante aerfridigilojn oni komparis du aparatojn, kies formoj kaj strukturoj estis identaj,

tamen diferencis laŭmaterie:

Tipo Ŝt: ŝtaltubo kaj ŝtallamentoj kun zinkizita interŝanĝa surfaco.

Tipo Al: ŝtaltubo kaj aluminio-lamenoj kiel termointerŝanĝiloj.

Por helpi la komparon ni indikaŝ kelkajn nombrojn. Jen la fridiga povo de ambaŭ aerfridigiloj, komence de la funkciigo.

Tipo Ŝt: 18 kW,

Tipo Al: 26 kW,

kio signifas, ke la aerfridigilo kun aluminio-lamenoj kapablis pli da povo je 44%, ol la geometrie tute identa ŝtala aerfridigilo.

La aerfridigiloj funkcias sub 0 °C, kaj pro tio dum funkciado la humideco de la fridkamera aero precipitiĝas surface de la lamenoj de la fridigilo, kaj tie ĝi glaciiĝas. Tiu glacitavolo forte malpliigas la povon de la aerfridigilo – pro la malbona termokonduktivo de la glacio. (Tial oni devas de tempo al tempo degeli ĝin desur la fridujaj forvaporigiloj.) Tio avertas, ke la aerfiridigilojn oni rajtas kompari nur en siaj laboraj cirkonstancoj.

Ni indikas sur la *Tabelo I.* kiel ŝanĝiĝis la fridiga povo ĉe la du aerfridigiloj dum 24-hora funkciado en la samaj cirkonstancoj:

Tabelo I:

Tipo de la aerfridigilo	Tempo de la funkciado				
	0 horo	4 horoj	8 horoj	12 horoj	24 horoj
	Fridiga povo en kW				
Tipo St	18	14	11,5	10	6
Tipo Al	26	25,5	23	20,5	14
Rilato Al/St	1,44	1,82	2,0	2,05	2,33

La lasta vico pruvas, ke komence de la funkciado la povo de la tipo Al je 44% superis la povon de la tipo Ŝt; sed je la fino de la funkciado (24a horo) la aluminia aerfridigilo jam superis la duoblon de la povo de la ŝtala tipo.

Kiaj avantaĝoj devenas el tio por la aĉetanto, resp. utiliganto?

La prezo de la aluminia aerfridigilo estas apenaŭ pli alta ol tiu de la ŝtala produktaĵo. Sed pro la pli alta povo, la aluminia tipo konsumos malpli da energio, kaj tio signifas vere grandan ŝparon. Laŭ niaj kalkuloj la ŝparo pri elektro-energio dum tutjara funkciado atingas eĉ 20-30 procentojn.

Se la fridigilo funkcias nur portempe, laŭsezone, tiam oni povas redukti la investajn elspezojn instalante aluminio-aerfridigilojn de malpli granda surfaco, ol se oni instalus la ŝtalajn aerfridigilojn.

La intensa esplorado daŭras plu, por konstati la optimumajn indikojn por la projekto kaj funkciigo de la aerfridigiloj. La ekzamenoj estas nun faritaj inter la funkciaj temperaturoj -30 kaj +10 °C.

La atendeblan uzdaŭron de la aerfridigiloj oni ekzamenas ankaŭ helpe de diversaj „turmentaj" provoj. Surbaze de tiuj oni povas aserti, ke la atendebla uzdaŭro – en normalaj cirkonstancoj – etendiĝas almenaŭ ĝis 15 jaroj. (Inter niaj aluminiaj aerfridigiloj troviĝas jam tiaj, kiuj senriproĉe funkcias de pli ol 10 jaroj.)

Disvolvante la teknikon de la aerfridigiloj, ni kreis plurajn tipojn por ĉiudirekte kontentigi la postulojn de la projektantoj kaj investantoj. (Vd. *Figuron 1.*)

La subaj tabeloj montras la ĉefajn indikojn de la aerfridigiloj de tipoj TX. Ili estas serie fabrikataj depost 1981, kaj liveritaj al Ĉinio, Irako, Alĝerio, la plej multaj en Sovetunion.

Aerfridigaj surfacoj de tipoj TX **Tabela II.**

longo mm / surfaco m^2		divido mm										nombro de ventoliloj
		5	6	7	8	9	10	12	14	16	20	
950	1	75	63	54	47	42	38	32	28	24	20	1
	2	168	141	121	106	95	86	72	62	55	45	1
1425	1	113	94	81	72	64	58	49	42	37	31	2
1900	1	151	126	109	96	86	77	65	56	50	41	3
	2	339	283	244	215	192	174	147	127	112	92	2
2850	1	226	188	162	144	128	116	98	84	74	62	4
	2	508	426	367	323	288	261	220	190	168	137	3
3800	1	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-
	2	678	568	489	431	385	348	293	254	224	184	4

CEFAJ DIMENSIOJ DE AERFRIDIGILOJ TX *Tabelo III.*

Tipo	TX-11	TX-12	TX-13	TX-14	TX-21	TX-22	TX-23	TX-24
A mm	1250	1755	2200	3150	1250	2200	3150	4100
B mm	805	805	805	805	1125	1125	1125	1125
C mm	900	900	900	900	1160	1160	1160	1160
L mm	950	1425	1900	2850	950	1900	2850	3800
Od NÁ	50	50	50	50	50	65	65	80
OD mm	400	400	400	400	600	600	600	600
	1				2			


L
A
C
B
ϕ d
ϕ d
3"

MASO DE AERFIDIGILOJ TX *Tabelo IV.*

longo mm / maso kg		divido mm										nombro de ventoliloj
		5	6	7	8	9	10	12	14	16	20	
950	1	152	145	142	139	134	130	126	122	120	119	1
	2	314	296	287	278	271	266	258	253	248	243	1
1425	1	256	245	237	232	227	224	218	214	212	208	2
1900	1	302	287	278	270	264	260	252	247	244	238	3
	2	625	589	571	553	539	529	513	502	493	481	2
2850	2	936	882	855	828	807	792	768	751	738	720	3
3800	2	1244	1172	1136	1100	1072	1052	1020	998	980	956	4

Alia uztereno de la lamenaj termotransigiloj estas la aplikado en la *varmoradiiloj* (radiatoroj) funkciantaj super 0 °C.

Ĉi-kampe la kooperativo ekagis antaŭ nelonge, sed konscie utiligante la supre menciitajn spertojn, kiujn ni akiris pri la aluminio-lamenaj termotransigiloj. Ni ekzamenis ankaŭ la ripajn hejtilojn, taŭgajn por loĝejoj kaj kontoroj. La rezultoj estis same bonaj kiel ĉe la antaŭaj aĵoj.

La ekzamenita hejtilo estis *l m longa ripa hejtotubo kun mezuroj de 70 x 150 mm.*

La temperaturo de la enfluinta varmakvo estis 90 °C; la *tabelo V.* montras la mezuritajn indikojn pri la varmotransigo:

Tabelo V.

Malvarmigo de la akvo, °C:	18	19	20	21	22
Akvorapido m/s	Povo de hejto W				
0,1	1314	1281	1248	1217	1185
0,2	1443	1407	1371	1336	1301
0,3	1487	1450	1413	1377	1341
0,4	1509	1472	1435	1399	1361

El la *tabelo V.* oni povas konstati, kiom pli da povo – kompare al la kutimaj radiatoroj – transigas la eta, kie ajn uzebla ripa hejtotubo. La avantaĝoj eĉ pli reliefiĝus, se oni komparus ankaŭ la prezojn. Sed la nuna artikolo celas sole prezenti la produktaĵojn.

La kooperativo jam preparis sin grandserie fabriki tiujn varmradiilojn por senmanke kontentigi la alvenantajn mendojn.

La Fridteknika Industria Kooperativo dum sia 3-jardeka ekzisto tre forte evoluis, dank' al tio, ke ĝi ĉiam strebis produkti laŭ la bezonoj de la merkato. Ĝuste la daŭra konfido de la mendantoj ebligis al la kooperativo okupi sian rekonatan pozicion.

Oni devas kompreneble gardi tiun lokon en la merkato per la teknika nivelo, aspekto, kvalito kaj fidindeco de la produktaĵoj, samnivele kun la similaj produktaĵoj de la gvidaj Eŭropaj firmaoj.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

recenzoj - recenzoj - recenzoj

Demetu la rapidajn lipojn!

Jarlo Martel-Monto (Jarl Hammarberg): AJN – senvortaĵoj kaj aliaj poemoj. Författares Bokmaskin, Stokholmo, sen jaro. 150 p. 28 x 28 cm.

Karl Krolow, unu el la ĉefaj teoriuloj de la modernismo, vortumas jene: „La migrado de la vorto sur la terenojn de la grafiko kaj tipografio estas eksperimento fuĝi." Jarlo Martel-Monto mem difinas sian lokon inter la kulturantoj de la „konkreta poezio", inter ĝiaj teknokrataj praktikantoj. Li rigardas siaj antaŭuloj Hans Arp kaj Kurt Schwitters, konantajn dadaistojn. Tamen li kalkulas siajn praulojn en du artoj: pentrado kaj poezio. Inter la pentristoj ni menciu la kubistajn Picasso kaj Braque, inter la poetoj Max Bill kaj Eugen Gomringer. Li ligiĝas ankaŭ al la svedaj tradicioj, ĉefe al la pentristo-poeto Oyvind Fahlström. Martel-Monto uzas ankaŭ la spertojn de la franca muzikisto Pierre Schaeffer.

Martel-Monto deklaras: „Mia verkista pensmaniero parencas al pensmaniero de moderna pentristo kreanta nefigurativajn bildojn, aŭ de eksperimentanta sonkomponisto."

La volumo enhavas entute 27 poemojn, el kiuj nur 3 similas iom almenaŭ forme la klasikajn poemojn. Sed la celo ankaŭ ĉe tiuj estas tute malsama: la vortoj liberiĝas el la teksto kaj obeas du leĝojn: tiun de la pli-malpli hazarda kombiniĝo kaj tiun de la konkreta muziko. Ĉi-lasta utiligas la naturajn sonojn kiel ekzemple diversajn bruojn, vagonarfajfon ktp. Ankaŭ la lingvo estas ĉi-kaze „nur" natura sonaro por la poeto. Sekve ni trovas tiajn versojn: „sor! sor! sor! – krianteĵ trans preter sor / baj baj! tenebre." Tamen la poeto kelkfoje eniras kaptilojn de la klasika poezio: „Ni kaptas niajn kurantajn ŝuojn / de la somera mateno."

Por la poeto ĉiuj tekstoj estas krudmaterialo: Esperanto-leciono por svedoj same kiel kolofono.

La alia tipo de liaj poemoj ekiras de la grafika-pentrista flanko. Jen li verkas poemon el ciferoj, krisignoj, dupunktoj, komoj, parentezoj, jen el kvadratoj kaj cirkloj, jen el tajpitaj literoj. En tiu branĉo la plej sukcesa estas – laŭ mi – *Poemo el literoj eltonditaj.*

Espereble la verkisto havos emon kaj fortojn por vastigi la ĝisnunajn kadrojn, espereble li aplikos muziknotojn, internacie uzatajn signojn, trafiksimbolojn. Eble li malkovros novan eblon en la aplikado de koloroj, eble li uzos ankaŭ la trian dimension kaj ni aŭdos baldaŭ pri skulptaĵo-poemoj, kiuj famigos krom la verkisto ankaŭ Esperanton.

Nia Esperanta literaturo apartenas al la plej konservativismaj de la mondo, eble ĝuste pro tio, ĉar la atento de niaj verkistoj dekomence turniĝis al la klasikaj idealoj. Mi povas subteni tiun ĉi mian opinion per konataj eldiroj de Zamenhof, aŭ per la fakto, ke nia hungara literatura skolo „Nyugat" ('Okcidento') pere de Kalocsay fortege influis la tutan Esperanto-literaturan kampon.

Esperanto estas unu el la plej unikaj, mondskalaj lingvaj eksperimentoj, do ĝuste pro tio estas mirinde, ke niaj artistoj ne eksperimentas en la periodo de la diversaj ismoj. En la hungara literaturo la avangarda direkto fortiĝis ĉefe post la falo de la Hungara Konsilantara Respubliko kaj ĉefe inter la elmigrintaj artistoj (la plej elstara reprezentanto estas Lajos Kassák), kiuj vivis en fremdlingva medio en Vieno kaj tie alfrontis gravajn lingvajn problemojn, kaj ĉio ĉi – inter aliaj kaŭzoj – fortigis la strebadojn poemi internacie. Ĉar jes ja, la bildpoemoj aspiras je internacieco. Do ne estas hazarde, ke fine la Internacia Lingvo kaj tiu ĉi internacia arto kunfandiĝis en la arto de Martel-Monto. Ni povas vortumi, ke tiu fenomeno estas historie kondiĉita, ja ambaŭ direktoj serĉas elirvojon el la multlingveco.

Martel-Monto estas – laŭ mia scio – sen prauloj en nia literaturo, kaj li – verdire – ne povas antaŭvidi vastan populariĝon, ja liaj lingvofilozofiaj kaj semiologiaj kialoj estas iom nekutimaj, ĉar la kromvidaĵaj kaj -aŭdaĵaj signifoj estas esoteraj. Ni estimu la kuraĝon de la poeto kaj ni lasu lin eksperimenti.

Fine ni konstatu, ke la strebadoj prezenti la vidan flankon de la poemoj estas preskaŭ samtempaj kun la poezio. Tiu klopodo estas kontinua de la helena Teokrito ĝis la nuntempuloj, ni diru: ĝis la esperantista Martel-Monto. Ĉio ĉi atentigas nin ne simple priridi lian arton pro ĝia nekutimeco. La analizado de tiu literatura branĉo estas unu el la interesaj kaj gravaj taskoj ankaŭ de nia filologio.

Imre *Szabó*

Tenera amromano

István Nemere: Febro. Originala romano. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. ISBN 963 571 143 3. 131 p. 21 cm.
Prezo: 15,- ned.gld.

Kun sciencfikciaj temoj tra estinteco kaj futuro ni paŝas sur virtuoze vortarangĝitaj Nemeraj vojoj kie abundas impresplenaj, efektaj scenoj kaj fine ni aliras al la nuna mondo plena de simplaj, ordinaraj, sed ĉiam aktualaj detaloj de la homa vivo.

Anna, ĉarma virino, vivas kun la edzo, inĝeniero, en seninfana edzeco; en malvarma medio kie agonias ŝia koro. En ŝin enamiĝas divorcinta verkisto, kiu ŝin amas kun sentoj noblaj kaj profundaj. Anna gravediĝas kaj pretas forlasi la edzon. Dum mallonga foresto de la ĉefrolulo, laŭ la polica raporto, Anna ŝin mortigis, ĉar ŝi venis en konflikton kun la edzo.

Sed la protagonisto de la romano nepre volas malkovri la veron, nome,

ke estas la inĝeniero kiu murdis sian edzinon.

En detektiva maniero de agado, per psikologie kaj detale elpensitaj metodoj, li konstante persekutas la krimulon. Dume fragmente, kvazaŭ surekrane, antaŭ liaj okuloj, aperadas la scenoj ek de la unua renkontiĝo ĝis la morto de Anna.

Al Nemere ĉio homa estas konata, eĉ tio kio koncernas la vualitajn regionojn de la homa subkonscio. Li imponas per sia esprimoplena forto, flua stilo, riĉa vortprovizo. Psikajn fenomenojn, la subtilecon de la ina animo li prezentas al ni vortabunde kaj sisteme. Oni povas montri sian virecon kaj samtempe pruvi ke eĉ en fortaj muskoloj cirkulas sentoj teneraj. Ni, virinoj, havos por li grandan simpation ! „... mi kisus miajn dezirojn sur ŝian vizaĝon." (p. 30.).

Dum ĉie ĉirkaŭe eksplodas la beleco de la naturo. Ĝi estas parto de lia ekzisto, ĝi estas la propraĵo de lia animo. „... sub nuboza ĉielo koloriĝis la aero, verde eksplodis la arboj kaj la malhelo rapide ŝteliris el siaj dumtagaj kaŝejoj." (p. 18.) „Veas en mi la bruliĝanta herbaro, la pinoj, la promeno, la kisoj, la bona proksimeco de Anna." (p. 61.) „... flirtas la haroj, la fingroj de la vento kaŝiradas sub mian ĉemizon." (p. 38.) „Enspirante la aeron – ĝi havas odoron de vespero, de lacaj akacioj, de malpeza polvo de trotuaroj." (p. 130.)

Estis granda ĝuo legi la verkon de Nemere.

Gustumu la plezuron sekvi la scenon de la unua nokto de amoro. Ĝi estas unu el la perloj, kiuj ornamas la tekston de la libro titolita „Febro".

Zora *Heide*

La aferoj en pura simplo

V. Eroŝenko: Stranga kato. Noveloj. Kompilis: Mine yositaka. El la japana lingvo tradukis: Sakamoto Syôzi, Konisi gaku, Ŝibajama Ĵun'iĉi, Takeuti tomiko kaj Miyamoto masao. Eldonis. Japana Esperanta Libro-kooperativo, Toyonaka-si, 1983. 83 p. 18 cm. Prezo: 14,- ned.gld.

V. Eroŝenko (1890-1952) estas unu el la plej konataj figuroj de la Esperanta kulturo, tamen, ne tiom per siaj verkoj, kiom per sia aventurplena vivo. Ne ĉiutage ja oni renkontas blindan ruson, kiu ellernas plurajn lingvojn, fariĝas entuziasma esperantisto, travagas plurajn Aziajn landojn, verkas en la japana lingvo kaj Esperanto, kaj liajn verkojn tradukas al la ĉina lingvo lia amiko, kiu estas *Lusin*, giganto de la moderna ĉina prozo.

Jes, la nomo de Eroŝenko sonas konata al la oreloj de esperantistoj, sed liaj verkoj ne atingis tre vastan popularecon, unuavice pro la fakto, ke ili ne estis aĉeteblaj. En la jaro 1979 komencis eliri ĉe Japana Esperanta Librokooperativo liaj verkoj, sub la zorga editorado de Mine yositaka. La unua volumo estis *Lumo kaj ombro* (1979), kiu enhavis la Esperantlingve verkitajn novelojn kaj poemojn de la fama aŭtoro; *La tundro ĝemas* (1980) estas kolekto de skizoj pri la vivo de ĉukŝoj, popoleto vivanta en Sovetio; en *Malvasta kaĝo* (1981) aperas kvar noveloj-fabeloj, tradukitaj el la japana lingvo fare de Miyamoto masao.

Stranga kato same enhavas novelojn – pli precize: simbolajn-alegoriajn fabelojn – tradukitajn el la japana lingvo. Escepto estas la titoldona novelo, kiun Eroŝenko mem tradukis en Esperanton, do, ĝi povas esti rigardata originalaĵo. Fine de la volumo aperas du paroladoj de Eroŝenko, faritaj en Esperanto.

Kvin el la ses noveloj estas tradukitaj de konataj japanaj esperantistoj senriproĉe, en klasika Esperanto. La tradukintoj sukcese klopodis imiti la Esperantan stilon de Eroŝenko, kaj tial la tradukoj *vere* legiĝas kiel originalaĵoj.

Kiel jam menciite, tiuj ĉi ses noveloj estas fakte simbolaj-alegoriaj fabeloj, ĝenro tre populara en la komencaj jardekoj de nia jarcento. Por personoj, kiuj ŝatas la rafinitan literaturan modernecon, ili eble ŝajnos iom eksmodaj, naivaj, ja la pensa kerno plej ofte estas tre simpla (*Koro de aglo, Malŝparo de favoraj donacoj, Homoj-dioj sur Jupitero).* Tamen, la simplan pensan kernon akompanas ne malŝatindaj garnaĵoj: svelta, proporcia konstruo, alta kaj aŭtentika poezieco. En *Kapo de scienculo, Stranga kato* kaj *Pluvas* ankaŭ la idea bazo enhavas punktojn tre originalajn, surprizajn. La plej bonaj pecoj de la volumo estas la lastaj du: *Stranga kato,* kun sia tre sprita, sagaca alegorio, kaj *Pluvas* kun sia lerta kaj logika filozofado.

Eroŝenko estis ne aparte komplika homo, nek kiel personeco, nek kiel artisto. Tiu fakto nuntempe ne estas bona pasporto por la sukceso. Tamen, ĝuste pro la simpleco de sia pensado la bazajn valorojn de la homa ekzistado li vidis tre klare. Kaj por nia komplikema pensmaniero la legado de liaj verkoj povas esti tre utila. Ni profitu la okazon!

Vilmos *Benczik*

Amuza legolibro (ne nur) por komencantoj

Albert Lienhardt: Amuza legolibro en Esperanto. Gradigitaj legaĵoj en simpla lingvo-stilo kun 2000 didaktikaj demandoj kaj respondoj por junaj legantoj de la Internacia Lingvo. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 21 cm, 216 p. ISBN 963 571 124 7. Prezo: 16,50 ned.gld.

La duan fojon oni mendas ĉe mi recenzon pri libro de A. Lienhardt. Mia unua recenzo estis malfavora: temis pri propono reformi Esperanton sub preteksto de forigo de la supersignitaj literoj. La nuna tasko estas agrabla, ĉar temas pri libro ne nur bonkvalita, sed ankaŭ utila.

La esencon de la libro klarigas la mezepokece longa titolo. Ĝi konsis-

tas el cent anekdotoj, sufiĉe amuzaj, almenaŭ ne tedaj. La nombro 2000 signifas, ke estas 1000 demandoj kaj 1000 respondoj.

En la „antaŭ-parolo" la aŭtoro klarigas la principojn de sia varianto de „Esperanto laŭ-eble simpla kaj facile komprenebla":

1. uzi frazojn kiel eble plej mallongajn,
2. uzi, prefere, vortojn kutimajn,
3. eviti, laŭ-eble, neologismojn,
4. uzi participojn, nur tiam, kiam estas nepre necese,
5. eviti malklarajn kaj pezajn vort-kunmetojn,
6. uzi ligo-streketon en du-radikaj kaj pli-ol-du-radikaj vort-kunmetoj,
7. ĉe linio-fino uzi divid-streketon, dividante la vort-kunmetojn laŭ iliaj konsistigaj elementoj,
8. eviti, laŭ-eble, la elizion de la finaĵoj interne de la vort-kunmetoj,
9. eviti ne-necesan anstataŭon de certaj prepozicioj per akuzativo,
10. uzi interpunkciajn signojn malavare,
11. adapti, laŭ-eble, la sinsekvon „subjekto-verbo-komplemento",
12. eviti, laŭ-eble, la substantivigon de verbo por esprimi agon.

La adopto de tiuj kriterioj en lego-libroj por komencantoj estas pli-malpli akceptebla. Sed Dio nin gardu etendi ilin al la cetera lingvouzo, precipe por beletro! Tiukaze la beletraĵoj gustus kiel glaso da oleo!

Albert Lienhardt estas fakdelegito de UEA pri lingva kontrolado de manuskriptoj. Efektive, lia lingvaĵo estas klara, krom tio, ke li konfuzas la pronomojn „kiu" kaj „kia": „*Kia* estas la aĝo de Alekso? – La aĝo de Alekso estas kvar jaroj." „*Kian* donacon vi volus ricevi? – Mi volus trumpeton." La vorto „aĝo" trafas ankaŭ alian malfeliĉan situacion: „*Kiom* estas via aĝo?"

La libro estas bele eldonita, kun plaĉaj desegnaĵoj de István Endrődi. Ĝi estas la tria amuza didaktika verko de la aŭtoro. Mi estas konvinkita, ke li alportos utilon al la Movado per ili, ne per lingvoreformoj.

Boris *Kolker*

Aprecata pasinto

Anikó Kiss: La Fortikaĵo en Gyula. Eldonis: Kleriga Sekcio de la Urba Konsilantaro, Gyula, 1983. 32 p. 19,5 cm. Prezo por Hungario: 20,- ft.

La Esperanta turismo en Hungario signife fortiĝis. Ni povas sperti, ke la interesiĝo de niaj eksterlandaj geamikoj turniĝas plejparte al la regionoj, kie ekzistas fortaj movadaj kaj Esperanto-kulturaj nukleoj. Fariĝis jam tradicio, ke okaze de gravaj movadaj eventoj oni eldonas kajerojn, broŝurojn ankaŭ pri la gastigantaj urbo kaj departemento. Ĉio ĉi fariĝis ebla pro la respekta subteno de la lokaj sociaj kaj ŝtataj instancoj. Ĉefe en la kazo de konstantaj Esperanto-aranĝaĵoj eblas konstati, ke ankaŭ la ne-Esperantaj lokaj instancoj rigardas tiujn eventojn siaj propraj. La energio de la loka patriotismo ankoraŭ multe povos antaŭenigi nian movadon.

Ni povas nur kore saluti tiujn lokajn iniciatojn, kiuj strebas ekspluati la eblojn de nia internacia lingvo. Ni varme salutas nun la patriotojn de la urbo Gyula, kie ĉi-jare okazis jam la 22a Somera Esperanto-Universitato, komune aranĝita de la Scienc-popularigа Societo, la lokaj instancoj kaj la esperanti stoj. La Universitaton ĝis nun vizitis jam pluraj miloj da homoj, do estis jam aktuale eldoni informan kajereton pri la heroa pasinto de la gastiganta urbo. La modesta kajero konsistas el du partoj: „La historio de la fortikaĵo" kaj „Promeno en la fortikaĵo". La volumon ilustras 12 bildoj, plejparte historiaj.

En la tempo ni reiras ĝis la neolitiko. Antaŭ niaj okuloj aperas vasta panoramo de la kontraŭturkaj bataloj, malvenko, liberiĝo, kaj fine la nuna epoko. La dua parto de la libreto multe helpos la vizitantajn esperantistojn, ke ili re- kaj revenante povu saluti ĉiujn ŝtonojn de la fortikaĵo kiel konatajn. Legante la tekston ni povas senti krom la ĝojo iaspecan amaron, ja evidentiĝas, ke la flegado de la Esperanta teksto ne estis perfekta. Dum la legado ni havis tre fortan emon kapti krajonon kaj korekti preskaŭ ĉiulinie la tekston. Nekonsiderante la stilajn problemojn, mi sukcesis kolekti ĉiupaĝe gramatikajn malkorektaĵojn inter 2 kaj 10. Tiom estas iom tro. Tamen ni estu indulgemaj, ja tiu ĉi broŝureto estas iasence pionirаĵo. Estas mia forta konvinkiĝo, ke nepre necesas fondi komisionon, kies tasko estas lingve kontroli tiujn eldonaĵojn.

Mi, kiel hungaro, tre bone scias, kion signifas la opaj etnonimoj esperantigitaj, sed eksterlandanoj... Fine de la kajero ekzistas „Notoj", sed tie ni trovas la klarigon de unusola vorto: rofo. Sed vane ni serĉas ian klarigon pri „kurucoj" kaj „labancoj" ktp. Eble ne estus superflue klarigi ankaŭ la toponimojn: Gyulamonostora. La nomoj de reĝoj povus aperi esperantigitaj. Ne estas konsekvenca la uzado de nomformoj (ekz. sur paĝo 17 ni trovas ilin plene miksitaj).

Fine ni povas konstati, ke la eldonaĵo signas eble la komencon de tiaj broŝuroj pro la grava sintenoŝanĝiĝo de la neesperantistaj instancoj – tio estas ĝojige. Pro la lingva nivelo mi tamen konsilas al la ekskursogvidantoj ne doni la kajereton en la manojn de komencantoj.

Imre *Szabó*

Vienaj viroj kaj virinoj

Arthur Schnitzler: Anatol. Kvin unuaktaĵoj. Trad.: L. Grimme, K. Beckmann, H. Kraus kaj Grete Breunlich. Eld. Aŭstria Esperanto-Instituto, Wien, 1983. 68 p. 21 cm.

La juna Schnitzler (Ŝnicler) en ciklo de teatraĵetoj klopodis respeguli la ĝueman atmosferon de la siatempa grandburĝaro de Vieno. Malgraŭ la kultura glorperiodo de la Monarkia ĉefurbo, lia delikata sentemo rimarkis dekandencon, sencelajn vivojn, dise ŝvebantan melankolion – similajn al tiuj fenomenoj, pri kiuj *Musil* lasis ondadi la vivojn en sia romanego pri la agonianta Habsburga Monarkio.

Kiel ajn ŝanĝiĝis de tiam la mondo, la ciklo „Anatol", tiuj epizodece kunĉenitaj etaj amhistorioj aspektas moderne, precipe por la nuna teatra modo. La opaj pecoj reliefigas diversajn interrilatojn de viro kaj virino, kies neeviteblaj kaj eksplodemaj konfliktoj kaj kolizioj abunde ebligas karakterizi la naturon de la eternaj gesinjoroj. Ne necesas diri, ke ilia problemaro intense kreskis ĝis nun, eĉ ampleksiĝis tiom, kion eĉ imagi ne eblis tiutempe, antaŭ okdek jaroj. La erotiko apenaŭ vibras sur la scenejo de Schnitzler: li precize diagnozas, kiel ŝanĝiĝas la virinoj laŭcele, kiel la viroj stagne restas en la propra superemo, kaj same, restas eterne la ebloj

de la konfliktoj inter ili. Tamen tiuj ĉi ligiĝas strikte al la socia medio, al la klasaj kutimoj, kiuj donas esence pli da rajto al la vir/ec/o. La kontraŭpezo venas do pro la virina emo superregi, per la mil rimedoj de la ina rafiniteco.

Sur la scenejo de Schnitzler la dialogo devas akre sparki, ĉar en la skermado la klingojn anstataŭas sprite trafaj vortoj. Tamen la traduko ne mal ofte bremsas tiujn rapirojn, la trafoj ofte ne atingas la haŭton. Kvankam la lingvaĵo estas klara, sed foje tro eleganta por senti ĝin viva dum aktora recitado. Nur unu ekzemplon (kio iel montras ankaŭ la malfacilojn de la tradukado): *„Maks:* Kaj en kio solviĝas por vi la sekreto de la virino? " La etaj germanaj vortoj ĝene longiĝis en la alia lingvo, kaj tial la parolritmo malagrable difektiĝis. Atentinda afero por tradukistoj.

Nia literaturo gajnis legindan kaj belaspektan libron.

Ervin *Fenyvesi*

Pacmesaĝo el Japanio

Sutoo Kacuzoo: Pupo fariĝis cigno. Tradukis: Jamagata Esperanto-Klubo. Bildoj de Mita Genfiroo. Eldonis Jamagata Esperanto-Klubo, Jamagata, 1984. 18 p. 25 x 18,5 cm.

En la jaro 1927 alvenis belaj pupoj el Usono al japanaj lernejoj. La pupoj fermis la okulojn, kiam oni kuŝigis ilin, kaj malfermis la okulojn, kiam oni starigis ilin. La infanoj ŝatis la belajn pupojn, kaj ili sentis simpation ankaŭ al la sendintoj.

Sed venis la jaro 1941, Japanio ekmilitis kontraŭ Usono, kaj la juna instruistino Ĉijo, kiu ankaŭ gardis unu el tiuj donacpupoj, aŭdis tiajn frazojn: „Usona pupo estas spiono de la abomeninda malamiko. Trapiku tian pupaĉon per bambua lanco! " Ŝi volis savi sian pupon, sed sensukcese. Fine ŝi devis cedi, kaj ŝi dronigis la pupon en la lagon Okura, kun la jenaj vortoj: „Adiaŭ, mia kara pupeto! Refoje alflugu al ni post la fino de la nuna milito, renaskiĝanta en la figuro de cigno. Ĉar pupo kaj cigno estas ambaŭ simboloj de paco, ĉu ne? Neniam forgesu nin, kaj nepre ree alvenu! "

Dum multe multaj jaroj ŝi atendis la cignon, en kies figuro la koro de la pupo reflugis al la koro de Ĉijo, jam avino.

La balade simplan kaj belan modernan legendon akompanas tutpaĝaj koloraj ilustraĵoj, kiuj efike emfazas la fabelecan ŝvebon de la etoso.

V. *Benczik*

Ĉu erarinto aŭ makiavelisto?

Éva Tófalvi kaj Oldřich Knĭchal: Kiuj semas plorante... Originala romano. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1984. 107 p. 21 cm. Prezo: 15,- ned.gld. (Por Hungario: 200,- forintoj.)

Tiu ĉi romano dum kvar jaroj estis kvazaŭ fantomo: en 1980 ĝi gajnis la unufojan Premion Raymond Schwartz, kaj ni devis atendi kvar jarojn por legi ĝin. Tiu atendado ordinare utilas al neniu speco de verkoj, kaj tio veras verŝajne ankaŭ en la nuna kazo: la interesiĝo, vekita per la atribuo de la premio, malpliiĝis dum la forpasinta tempo.

La agado de la romano disvolviĝas dum la jaroj antaŭ la dua mondmilito en Hungario. (Kaj ne en Ĉeĥoslovakio, kiel skribis Reto Rossetti en sia recenzo, aperinta en Esperanto 1984/71. p. En la romano klare evidentiĝas, ke la ŝtataj organoj estas porfaŝismaj – tio estis karakteriza por Hungario, sed ne por Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ la certagrada hezitado inter la itala kaj germana aloj de la faŝismo estis hungara fenomeno.) La aŭtoroj tre interese kaj lerte kombinas en la verko bone konatan, ŝlosilan periodon de la ĉijarcenta historio kun esperantista fono; per tio ili plene certigas por si la atenton de la leganto, kiu volonte vidas sian minoritatan movadon en kunteksto de mondhistoriaj eventoj.

La protagonisto de la romano estas Stefano Bende, tre inteligenta, orfiĝinta burĝido, kiu tamen restas tute sen havaĵo. Kiam li ekscias tion, ankoraŭ kiel infano, li decidas ĉiupreze certigi por si riĉan kaj komfortan vivon. Plenuminte brile siajn studojn, li fariĝas universitata asistento – por kio li pagas per aliĝo al la faŝisma partio, kaj li fariĝas fakte sekreta policagento. Oni taskigas al li ellerni Esperanton, aliĝi al la Esperanto-movado, kaj transdoni al la komisiintoj informojn pri la agado de la esperantistoj. Li plenumas la taskon lerte kaj senskrupule, kaj reciproke li ricevas bele instalitan vilaon kaj sufiĉan monon. Kiel inteligenta persono, li bone vidas, ke la faŝismo ne povos venki, do li preparas sian planon de elsaviĝo, sed la ĉiam sukcesa, makiavele senskrupula Bende nun fiaskas. En la epilogo legiĝas: „Stefano Bende ne eskapis. Ĉe la sanatoria barilo embuskis anoj de la sekureca polico, per maŝo strangolis lin, deprenis lian valizon kun falsa pasporto kaj lian kadavron ĵetis en la riveron."

„Kiuj semas plorante..." havas ĉiujn atributojn por fariĝi sukcesa romano. Krom la supre jam aluditaj kialoj nepre meritas mencion la lerta redaktado. Bende prezentas sian vivhistorion retrospektive, kio ebligas al la aŭtoroj foje-foje rompi la rigoran kronologion sen tio, ke eĉ sensperta leganto perdu la fadenon. Kaj aliflanke, tiu rakontotekniko signife pliigas la streĉitecon, la leganto scivole kurigas la okulojn tra la linioj kaj paĝoj.

Ke la personaĵoj restas ne sufiĉe konturitaj kaj iom stereotipaj, ne multe gravas, krom ĉe la protagonisto, kies anima tutnigreco iom agacas min. Li estas tiel evidente malbona, ke mi ne kapablas eĉ koleri kontraŭ li – por mi li restas nur simbolo de la Malbono, ne erarvaganta malfortulo, kies sorto povus havi instruaĵon ankaŭ por mi, erarema homo. (Tial konsternis min la plurfoje aperinta reklamteksto, kiu diras, ke Stefano Bende „erarvagas sub influo de la faŝisma ideologio." Bende efektive ne estas tuŝita de la faŝisma

ideologio: mankas el li ĉia inklino al romantiko kaj ideologioj. Li simple vendas siajn kapablojn al la faŝismo, ĉar ĝi estis preta pagi bonan prezon por ĝi.)

La lingvaĵo de la romano estas ĝenerale bona, la dialogoj eĉ pli bonaj ol la nivelo de la tuto. Tamen, oni ne rajtas uzi la vorton *senriproĉa,* kion oni prave atendus de UEA-eldonaĵo. Precipe oftas la manko de la difina artikolo. Jen, kelkaj ekzemploj: „spite al (la) glacikovrita trotuaro antaŭ la universitato"; „ŝriko aŭdiĝis el (la) granda aŭditorio – kaj ties reeho sonis dum kelkaj sekundoj en (la) longaj koridoroj"; „mi eniris (la) antaŭhalon" (ĉiuj sur p. 33); „mi povus aliĝi al (la) simpatiantoj de la germana partio" (p. 40); „mia patro perdis (la) laboron" (p. 71). (La interkrampaj artikoloj mankas el la teksto.) Malgraŭ tio, la stilo estas entute agrabla, flua, legiga.

Per „Kiuj semas plorante..." la Esperanta romano fariĝis pli riĉa. Estas aparte bonvena la primovada temo, delonge neglektita de niaj verkistoj. Ni esperu, ĝi ne estos la lasta romano de la sukcese debutinta aŭtora paro.

V. *Benczik*

Unika antologio

Tibor Sekelj: Elpafu la sagon. El la buŝa poezio de la mondo. Serio Oriento-Okcidento n-ro 18. Sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio en konsultaj rilatoj kun UNESKO. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1983. 187 p. 21 cm. Prezo: 27,- ned.gld.

Esperanto vivas jam preskaŭ jarcenton, sed ĝi vivas plejparte inter eŭropanoj, kaj sur tiuj teritorioj de la mondo, kiujn la Eŭropa kulturo konkeris por si. Kaj ankaŭ en tiuj landoj ĝi fariĝis la komunikilo de iu malmultnombra elito, ja nuntempe ankoraŭ necesas tre specialaj intelektaj, ideologiaj kaj psikaj kvalitoj por aparteni al la malvasta rondo de la intensaj uzantoj de la Internacia Lingvo.

Tiuj supraj faktoj grandparte influis ankaŭ la formiĝon de la Esperanta literaturo, originala kaj tradukita. Tial estas aparte salutinda la kolekto „Elpafu la sagon" de Tibor Sekelj, tiu ĉi personeco unika eĉ en la kadroj de la Esperanto-movado. Specialan valoron signifas la cirkonstanco, ke la plejparton de la poemoj kolektis Sekelj mem: tiamaniere ĉi tiuj naturaj perloj de la monda poezio atingas nin kvazaŭ senpere.

La kolekto enhavas 138 pecojn de la buŝa poezio de popoloj ekster Eŭropo, de Groenlando ĝis Novzelando. Sekelj grupigas ilin en 16 laŭtemaj sekcioj, kiel „La kreado de la mondo", „Amo", „Milito", „Nutraĵo", „Danĝero – Morto" ktp. La lasta sekcio titoliĝas „Renkonto de du mondoj"; la poemoj en tiu ĉi sekcio estas ĉiuj malgajaj, ja la renkonto kun eŭropanoj por la indiĝenoj ordinare estis malgajiga, kiel atestas la suba poemeto de Kiova-Apaĉoj (Usono):

Danĝera loko

La mondo estas danĝera loko
por la vivo de Indianoj.

Venu kun mi, mia popolo,
mi kondukos vin al sekura loko.
Tie, sub la akvo,
tie ekzistas raviga loko.

Tiu loko estas kreita
por la sekureco de Indianoj.
Tien la pakehoj ne sekvos ilin.

„Pakeho" signifas „eŭropano, blankulo, iom admirita, iom malamata." Por povi krei adekvatajn tradukojn ankaŭ laŭ atmosfero, Sekelj devis enkonduki iom malpli ol 50 vortojn, korekte glositajn fine de la libro. Liaj tradukoj legiĝas tre facile kaj flue, kiu kvalito cetere estas rajte atendebla de antologio de buŝa poezio. (Tamen, tiu kvalito ebligas, ke la libron alfrontu kuraĝe ankaŭ personoj, kiuj ne facile legas modernan poezion.)

Aliflanke, en tiu ĉi volumo vane oni serĉos artifikajn majstraĵojn, formajn bravaĵojn aŭ esprimon de komplika pensogimnastiko. La ĉefa virto de tiuj ĉi poemoj estas natura, freŝa vortbildigo de simplaj pensoj kaj sentoj, komunaj fakte por ĉiuj homoj en la mondo. Tio tamen ne signifas, ke mankas el tiu ĉi poezio ĉia profundeco. Bele ilustras tion la suba poemo el la poezio de la Azteka popolo (Meksikio):

Averto de Necaŭalkojotl

Neniu malgaju ĉi tie,
amikoj niaj!
Ĉu povas tiu ĉi tero
esti ies domo?
Neniu restas sur ĝi!

* *

Eĉ la plumoj de kecalo ŝiriĝas,
la koloroj paliĝas,
la floroj forvelkas.

* *

Kio ajn ekzistas,
reiras al lia domo,
tiel ankaŭ ni,
ho, kreanto de vivo,
nur dum momento
ekzistas apud vi.

„Elpafu la sagon" sekvas en la Serio „Oriento-Okcidento" la poezian antologion „Tutmonda Sonoro". Kalocsay transdonis imponan bukedon el la skriba poezio de la mondo, Sekelj regalas nin per bukedo ne malpli impona sed nepre pli surpriza kaj originala. Espereble nia publiko scios aprezi ĝin.

La poemojn akompanas kelkaj – tre malmultaj – fotoj kun scenoj el la vivo de iuj popoloj, kies poezio estis prezentita en la volumo. Mi volonte vidus multe pli da fotoj, aŭ, preferinde, specimenojn el la bildarto kaj skulptarto de la koncernaj popoloj, por kompletigi la ravon, kiu radias el la poemoj.

V. *Benczik*

La vivo de neordinara homo

Ferenc Szilágyi: La vivo de Sándor Kőrösi Csoma. El la hungara tradukis:

Ervin Fenyvesi. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. Ilustrita. ISBN 963 571 139 5. 151 p. 21 cm.
Prezo: 15,- ned.gld.

Kiam oni konsultas min pri tio, kiuj Esperantaj libroj, eldonitaj en Hungario, estas âĉetindaj, mi senhezite respondas: *ĉiuj.* Mi ĝojas, ke ankaŭ tiu ĉi libro, kiu entenas la (hontinde por mi nekonitan) vivon de Kőrösi Csoma, estas aĉetinda, leginda kaj pripensinda.

La vivo de Kőrösi Csoma iom memorigas pri la neordinara vivo de la konata esperantista klasika verkisto, Vasilij Eroŝenko. Sándor Kőrösi Csoma naskiĝis antaŭ 200 jaroj (la libro estas jubilea eldono) en Transilvanio (nun Rumanio). En la atmosfero de la kreskanta nacia memkonscio li dediĉis sian vivon al la esploro de la hipotezo pri la Azia deveno de la hungaroj. Sed, simile al Kristoforo Kolumbo, li malkovris ion alian: la lingvon, literaturon, historion, geografion de la mistera Tibeto, fariĝante fondinto de la tibetistiko.

Lia vivo estas modelo de abnegacia servado al la Scienco. Piede li trairis duonon de la terglobo inter neimageble malfacilaj cirkonstancoj, vivis la vivon de asketo, studis multajn lingvojn Eŭropajn kaj orientajn – kaj ĉion ĉi li faris fakte senmone. La agnosko de lia scienca agado venis en la fino de lia vivo, rezulte de la eldono de la Tibetaj gramatiko kaj vortaro, kiuj restis aktualaj ĝis nun.

La libro de Ferenc Szilágyi (kies nomo nur hazarde samas kun tiu de la konata Esperanta prozisto, iama redaktoro de Norda Prismo), estas fonto de unikaj informoj, ĝi enhavas multegon da raraj ilustraĵoj, legiĝas tre facile. Mi notas nur konfuzon de *lia-sia,* kaj etajn asprajojn. Estus bone, se ĝi fariĝus la unua verko de iam eldonota bonkvalita serio: „La vivo de eminentaj homoj."

Boris *Kolker*

Dezirinda ankaŭ en Esperanto

Interlinguistica Tartuensis. Interlingvistikaj studoj, eld.: Tartua Ŝtata Universitato, Tartu, 1982. 200 p. 20 cm. Prezo: 1,50 rubloj.

Tiu unua volumo de scienca serio estas dediĉita al la 75-jara jubileo de akademiano *Paul Ariste,* famkonata estona lingvisto, kiu estis membro ankaŭ de la Akademio de Eo. Dek unu scienculoj prezentas plejparte ruslingvajn studojn pri teoriaj problemoj de la interlingvistiko, krome pri internaciaj aspektoj de etnolingvoj. Ses studojn sekvas E-lingvaj resumoj – bedaŭrinde tre mallongaj. Vere atentinda ŝajnas la studo de A.D. *Duliĉenko* pri difino kaj loko de interlingvistiko ene de la sciencoj. Li priskribas i.a. la elformiĝon de tiu lingvistika branĉo, kaj pruvas ties taŭgecon kaj perspektivojn. Estus tre utile tiun artikolon konigi al lingvistoj tra la mondo, precipe ĉe universitatoj. Ni legis iom mirigite la aserton de N.S. *Kuznetsov,* ke „la planlingvoj peras la internajn bezonojn de tiu socia *komunumo* (!) al kiu ili apartenas..." Do kvazaŭ sekreta lingvo aŭ propra slango de iu komunumo. Tiu koncepto simple kolizias kun la faktoj, almenaŭ pri Esperanto.

Interesajn indikojn havas probable la statistika artikolo de S.L. *Dorenko* pri la lingvoj uzataj en granda aro da internaciaj organizaĵoj, ties resumo en Interlingua (kial?) bedaŭrinde ne prezentas la malkovritajn interrilatojn de la faktoj. V.H. *Ĥromov* esploris la bibliotekon de L. *Tolstoj,* kaj trovis la rimarkindan fakton, ke li posedis 15 E-verkojn!

Kiam ni plenvolonte aliĝas al la omaĝantoj de Paul Ariste, ni esprimas ankaŭ la deziron, ke la Universitato publikigu almenaŭ kelkajn el la science plej interesaj studoj ankaŭ E-lingve.

Ervin *Fenyvesi*

Aklaminda reeldono

Henrik Seppik: La tuta Esperanto. Gramatiko por progresantoj, gvidilo por kursestroj. Tria eldono. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. ISBN 963 571 127 X. 184 p. 21 cm.
Prezo: 15,- ned.gld.

Maloftas reeldonoj de Esperantaj libroj. Tiom pli estas aklaminda libro, kiu aperas triafoje. Tiu ĉi libro ne malaktualiĝis malgraŭ tio, ke ĝia unua eldono aperis en la tempo, kiam Esperanto aĝis nur duonon de la hodiaŭa aĝo.

La tipo de la libro estas malfacile difinebla: ĝi estas popularstila plena gramatiko, kaj samtempe lernolibro por progresantoj, ĉar ĝi enhavas ankaŭ iom da tekstoj kaj ekzercoj.

En 20 lecionoj, konsistantaj el entute 152 eroj, la aŭtoro pritraktas detale, klare kaj sufiĉe moderne la tutan Esperanton.

Granda atento estas donita al helpaj vortoj kun proksimaj sencoj, kion akompanas abundaj ekzemploj: „kio-kiu-kia", „kiel-kvazaŭ", „pli-plu", „ankoraŭ-jam-plu", „ĉu-aŭ", „nek-eĉ ne unu", „por-pro" ktp.

La lasta leciono enhavas iom da esperantologiaj informoj („Stilo", „Historio de Lingvo Internacia", „Mallonga biografio de Zamenhof", „El la evoluo de Esperanto") kaj rekomendojn por plua perfektiĝo kaj lingvouzado.

La eldonistoj avertas, ke intertempe la lingvo kaj la lingvistiko evoluis, kion la libro, senŝanĝe reeldonita, ne povas konsideri. Tio estas precipe videbla en la fonetika parto. Ekzemple, estas rekomendate prononci „n" antaŭ „g" kaj „k" iom naze, kio estas „natura prononco". Natura por kiu ? Anstataŭ diri, ke asimiliĝo (absoluta-apsoluta) estas tolerebla, ĝi estas deklarata sole natura. Mi observis prononcon de tiaj vortoj ĉe estonoj, kaj povas diri, ke por ili (ĉu nur por ili?) asimiliĝo estas tute kontraŭnatura.

Konklude: la libro estas studinda por progresantoj, kursgvidantoj kaj lingvaj spertuloj.

Boris *Kolker*



Invito al la 71a UK

Pitoreska Pekino. Verkita de Ĉeng Limin kaj Sen Taŭ. Esperantigita de Zoŭ Guohiang, Hju Vanfen, Lu Binŝeng. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. 72 p. plus 14 paĝoj kun koloraj fotoj. 18,5 cm.
Prezo por Hungario: 50,- forintoj.

La bone redaktita kaj riĉe ilustrita libreto prezentas dek naŭ vizitindaĵojn en kaj ĉirkaŭ Pekino – verŝajne do „Pitoreska Pekino" estos la plej multe uzata libro dum la 71a Universala Kongreso, okazonta post du jaroj en la ĉina ĉefurbo.

Ĉe la komenco skiza mapo prezentas la situon de la 19 lokoj, el tiuj 10 estas en la urbo mem, kaj la ceteraj je kelkdek kilometroj de ĝi – la plej malproksima estas la Granda Muro, kiu situas je 70 kilometroj for de Pekino.

Laŭ la priskriboj kaj la artisme faritaj fotoj ĉiuj dek naŭ vidindaĵoj estas vere ravaj (Dio mia, kiuj ĉeestos la kongresajn aranĝojn?), tamen, antaŭsupozante, ke mi ne povos vidi ĉiujn (ja decos ĉeesti ankaŭ iujn ĉefajn aranĝojn de la UK) momente mi notis por mi La Ĉielan Altaron, La Grandan Muron, La lamaejon Jonghegong kaj la Tanĝe-templon kiel nepre vizitindajn.

Pekino havas plurmiljaran historion, do post du jaroj ni kongresos en urbo, kiu estis unu el la lululoj de la ĉina kulturo. Estas videble, ke la ĉinaj esperantistoj konscience preparas sin kaj la tutmondan esperantistaron por la 71a UK: post la bela libro „40 vizitindaj lokoj en Ĉinio" ankaŭ „Pitoreska Pekino" servas la celon alvoki la atenton de la esperantistoj pri la kongresurbo de 1986.

Kara Leganto, se Vi veturos al Pekino, aĉetu tiun ĉi libron, por konatiĝi anticipe kun la belaĵoj, kiujn vi vidos; se Vi ne povos veturi, aĉetu ĝin ankaŭ tiukaze, por esti almenaŭ anime post du jaroj en la kongresurbo.

V. *Benczik*

Du bildlibroj pri birdoj

Hejmoj de Birdoj Bildlibro. Teksto de Ju Zi. Bildoj de Wu Daisheng. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1983. 42 p. 20,5x18 cm.
Prezo por Hungario: 45,- forintoj.

Kiel kovi. Bildlibro. Teksto de Lin Songying. Bildoj de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino. 1983. 28 p. 17x18,5 cm.
Prezo por Hungario: 25,- forintoj.

Tiuj ĉi du bildlibroj enhavas ne fabelojn, sed bone redaktitan sciencpopularigan materialon pri ornitologio. Tamen, la fabeleca atmosfero restas, ne lastvice dank' al la ĉarmaj kaj kolorriĉaj desegnaĵoj.

„Hejmoj de Birdoj" prezentas, kiel riĉa estas la gamo de nestoj, konstruataj de birdoj. Eĉ malgrandaj infanoj volonte rigardas la bele desegnitajn nestojn kaj birdojn, kaj aŭskultas la akompanajn klarigojn – kiel mi konstatis tion ĉe mia kvinjara filino –, sed mi devas konfesi, ke la libreto ankaŭ por mi mem estis tre informriĉa. Mi rekomendas ĝin al ĉiuj urbanoj, kiuj certe miros, kiel sagace la birdoj elformis la nestomodelon plej taŭgan por sia speco.

„Kiel kovi" prezentas la sekvan fazon, t.e. kiam la nesto jam estas preta. Kiel kovi la demetitajn ovojn? – metas por si la demandon Kukolino. Ŝi vizitas multajn birdospecojn – eĉ Testudinon – por trovi la malplej tedan manieron, sed neniu maniero ŝin kontentigas. Fine ŝi metas unu sian ovon en la neston de Paruo, la alian en la neston de Turdo. Tio estas ago ne aparte honesta, tamen, legante la historion de ŝia vagado, ni povas konatiĝi kun la kovmaniero de multaj birdospecoj.

Ambaŭ libretoj estas vere legindaj, la lingvaĵo estas senriproĉa, kaj la ĉiupaĝaj koloraj ilustraĵoj rave belaj.

V. *Benczik*



Zbigniew Dobrzyński
(1936–1984)

Lastmomente ĉe kompostado de tiu ĉi numero venis la dolora sciigo: la 14-an de Majo en Varsovio forpasis aktoro Zbigniew Dobrzyński. Duobla perdo trafis esperantistojn: ni perdis samideanon, fervoran adepton kaj disvastiganton de Esperanto, kaj la sciigo pri lia morto certe signifas finon ankaŭ de Pola Esperanta Teatro, kiun li fondis en la jaro 1971 kun sia parulino-kunlaborantino: Kalina Pieńkiewicz.

Post pluraj filmaj, teatraj kaj televidaj sukcesoj en gepatra lingvo li dediĉis sin al la Esperanta teatra ludo: li estis samtempe peranto, vojaĝanta ambasadoro de la pola kaj Esperanta kulturoj. En pluraj Eŭropaj kaj Usonaj urboj oni povas memori lin, kiel reĝisoron kaj rolanton de teatraĵoj: *Proksima nekonato*, *Hipnoto* kaj *Malfermu la pordon*, kaj peranton de pola poezio. Ni, amantoj de la Esperanta teatro kaj beletro, kondolencas al la vidvino, s-ino Kalina Pieńkiewicz, kaj gardos lian memoron.

M.F.

GAJA PAĜO

Nunaj tempoj

– Vian filon mi rimarkis en terure neglektitaj, aĉaj vestaĵoj. Kial vi ne atentigas lin vesti sin pli dece?

– Ho amiko, mi jam avertis lin, ke li devos ne miri, se la knabinoj amase enamiĝos al li pro lia senorda eksteraĵo...

Nunaj kolegoj

– Pardonu ĉefo, sed mi ne eltenas, ke kolego Ĉap nomis min granda idioto.

– Nenion zorgu pri tio, tiu Ĉap ne kapablas juĝi! Li nur stulte ripetadas tion, kion diras la aliaj...

NUNAJ EDZOJ AŬ EDZINOJ?

– Sinjorino, kial vi edziniĝis kvinfoje? – demandis la juĝisto.

– Ĉar mi ŝatas la variecon, sinjoro. Vi devas scii, ke ĉiu viro havas aliajn difektojn.

Edzo, edzo...

– Hieraŭ mi havis egan kverelon kun mia edzino.

– Bedaŭrinda vi estas, amiko. Tamen kial?

– Ŝi diris, ke post vespermanĝo mi povas viziti la drinkejon por trinki unu glason, sed je la oka mi venu hejmen. Nu, mi trinkis ok glasojn, sed revenis je la unua...

Bona konsilo

– Doktoro! Vespere mi ne kapablas ekdormi, kion ajn mi faras. Kion vi konsilas?

– Jen facila rimedo por vi: imagu, ke estas mateno, kaj vi devas ellitiĝi. Vi certe tuj ekdormos!

Ne malsperta knabo

En informejo de la granda magazeno aperas eta knabo:

– Baldaŭ alvenos sinjorino ege ploranta. Ŝi plendos, ke ŝi perdis sian filon. Bonvolu trankviligi ŝin kaj direkti post min al la etaĝo de la ludiloj...

Impertinenta knabo

– Vi estas daŭre sentaŭgulo – krias patro al sia filo –, ekde via naskiĝo mi ricevis nenian plezuron pro vi!

Tuj reagas la eta impertinentulo, kaj pikas kiel pulo de rentulo:

– Sed antaŭe ja multe pli, ĉu ne, paĉjo?

Impertinenta hotelo

– Imagu, amiko, kiam ni atingis la montaron por skiadi, eĉ la hotelpordisto kolerigis min, ne nur mia edzino.

– Ĉu li ne donis ĉambron al vi?

– Ĉambron mi tuj ricevis, sed la pordisto kun la ŝlosilo donis ankaŭ presitan slipon: „Fartu kiel hejme – sed ne kondutu kiel hejme! "

Impertinenta edzo

– Iam vi estis feliĉa – plendas la edzino –, se vi povis min vidi nur dum du minutoj!

– Eĉ nuntempe mi estas feliĉa, kara mia – ĝemas la edzo –, se mi vidas vin nur dum du minutoj...

Plejimpertinentegulo

– Ri-rigardu tiun fri-friponon... mi jam bal-balbutas pro la ko-kolero: mi rakontis al li, ke mia edzino atendas baldaŭ ideton. Kaj li ku-kuraĝis demandi: *de kiu?*

Jam ne superebla

El la dancsalono dum paŭzo du gejunuloj eliras. Kiam ili revenas, ŝia hararo estas tre taŭzita, la vestaĵoj rimarkinde senordaj... De alia tablo leviĝas eleganta junulo, paŝas al la knabino kaj klinas sin:

– Fraŭlino, ĉu mi povas peti vian sekvan... paŭzon?

Jam pli modesta?

Post la paŭzo la teatra publiko revenas al siaj seĝoj. Venas ankaŭ viro kiu demandas sinjorinon sidantan en la vico:

– Pardonu, ĉu estis vi kies piedon mi antaŭe surtretis?

– Bedaŭrinde jes.

– Bone. Venu Marinjo, en tiu ĉ vico estas niaj lokoj.

Kurioza piediranto

– Rigardu tiun teruran figuron! – diras la ŝoforanta virino al sia edzo. – Li persistas antaŭ nia aŭto piedirante, kvazaŭ li volus subiĝi niajn radojn. Kion mi faru pri tiu impertinentulo?

– Stiru trankvile maldekstren – respondas la edzo – kaj konduku nian veturilon disde la trotuaro reen al la ŝoseo.

In-cito

La maljuna Abo Nanto plendas al la kuracisto pri malbona vidkapablo. Tamen la ekzameno trovas nenian malbonon ĉe li.

– Pro kio vi opinias, ke vi ne vidas bone? – demandas la kuracisto.

– Pro tio, ke mi ĉiam incitiĝis vidante belan virinon. Sed depost duonjaro mi neniam iĝas incitata.

Absoluta

– Ĉu ekzistas absolute mallarĝa rivero?

– Kompreneble. Ĝi havas nur unu-solan bordon.

E.F.



Pri frateco

„Pol', hungaro: frata paro..." – tiel komenciĝas konata en ambaŭ lingvoj versaĵo. La sekvajn tri versojn (en traduko de Grabowski) ni kaŝis en la ĉefaj linioj (H.1., V.15.) de nia enigmo. Ensendendaj linioj: H.1, V.15. Inter la solvantoj ni lotumos premiojn.
Limdato: unu monato post la alveno de la revuo.

Horizontale: Familia nomo de pola Esperanto-poeto ELSKI (aŭ bruna – germane) **16.** Maldolĉa **17.** Larme **18.** Ĉirkaŭa ekstremo de io (R) **19.** Ankoraŭ ne junulino **21.** Fantazii (R.) **22.** Membro **23.** Medikamento kontraŭ konstipo **25.** Rivero en Sovetunio **26.** Persona pronomo **27.** Longa vesto (R) **28.** Faris truon **30.** Sin movi **32.** Konjunkcio de komparativo **33.** Astronomia punkto sur orbito **35.** Ne ilin **36.** Persono, kiu agadas, varbadas ktp. laŭ komisio **38.** Reen: numeralo **39.** Malaperigis **41.** Loĝejo por brutoj **42.** Troveblas en kuvo **43.** ... Duopo: jubilea libro de Baghy kaj Kalocsay **45.** Alparolo al altgrada sinjoro (R) **46.** Identaj konsonantoj **47.** Mezurunuo por kampoj **48.** Numeralo **49.** Portugala monero (R) **51.** Tre malofta (R) **52.** Fluaĵo por skribi (R) **53.** Cikloforma peco el malmola materio (R) **54.** Frakcioj **55.** Antikva korda muzikilo **57.** Pasinta tempo nedifinita **58.** Mallongigo de la hungara ĉefurbo **60.** Brando eltirita el rizo (R) **62.** Miksita demandvorto **63.** Motoro de la korpo **64.** Surpriza interjekcio **65.** EET **67.** Irigu rapide antaŭ vi **69.** Rilata al antikvaj prauloj de Persoj kaj Hindoj **70.** Best-romano de István Fekete, esperantigita far Margit Leszkó **71.** Infane sensperta kaj kredema (R) **73.** Minerala graso, uzata kiel haŭtŝmiraĵo (R) **74.** Ne ina **75.** Grandaj loĝ-lokoj **77.** Ekstrem-orienta duoninsulo **78.** Larĝa apogseĝo (R)

Vertikale: Kemia elemento (R) **3.** Ekstrema parto de homa brako **4.** Senluksa barako aŭ butiketo (R) **5.** Membr' **6.** Kirasita militveturilo (R) **7.** Multnombran, senordan kolekton **8.** Erariga interplektaĵo de vojoj **9.** Deveno (R) **10.** Nord-Eŭropa lando (R) **11.** RP **12.** Persona pronomo **13.** Vorto por distingi iun **14.** Seka bruo de krevado, rompado **19.** Du famaj pioniroj de Esperanto a./ polo (tradukisto), b./ ruso (iniciatoro de la Enciklopedio) **20.** Regadsistemojn de dinastioj **23.** Penas altiri **24.** Organo de aŭdkapablo **27.** Granda ŝtono en la naturo (R) **28.** Franca vortaristo E-pioniro **29.** Diablo **31.** Paro de viro **34.** Legomo el la fam. de liliacoj **37.** Ago movanta ion ĉirkaŭ akso **40.** Komune ĉesigi laboron (R) **41.** Direkti veturilon **44.** Ia ajn **48.** Malagrabla sento de danĝero **50.** Fruktarbo (R) **53.** Tre malofta **56.** Ne kontraŭstari **59.** ...-Harbour: Azia havenurbo **61.** Mallonge sonigi kunfrapante du aĵojn **63.** Laŭtaj akraj voĉsonoj **64.** Interjekcio de aklamo aŭ entuziasmigo **66.** Longa osto inter genuo kaj maleolo (R) **68.** Prenos ion kiel rimedon **69.** Kudrilego uzata de ledlaboristoj (R) **70.** Drinkaĵo **72.** Reen: antaŭe ne ekzistanta (R) **74.** Komercaĵo (R) **76.** JD **78.** Reen: numeralo

Majse *Cifer*

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1984/2:

Ho amik', se en feliĉa horo al vi
la kor' jubilas,
Ne sidiĝu kun ridanta buŝo
apude de plorant'.

(Theognis, tr. *Kalocsay)*

Libropremion gajnis per lotumado: Carlo *Geloso,* Rosta, I; H. *Hofmann,* Jena, GDR; *Moskaljuk,* V.V., Vladimir-Volinskij, Ukrainio, SU.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

NI VIVOS!

Dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof

de Julian Modest

Pri la dramo „Ni vivos! " la konata E-poeto Jiři Kořínek publikigis recenzon en „Starto" (1983/6), kaj emfazis interalie: „La dramo pliriĉigas nian neabundan porscenejan literaturon, kaj estas aprezinde bonnivela. Lingve ĝi estas senriproĉa. La artisme prezentitan belan scenaron mi povas rekomendi al niaj teatraj ensembloj, sed ne malpli al niaj legantoj." Jen demandoj laŭ la scenoj:

1. Dum kiom da semajnoj Lidia ellernis Esperanton?
2. Kiun poemon Sofia recitas al Lidia?
3. Kion Lidia donacas al Ludoviko, okaze de lia 17-a naskiĝtago?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1984/2:

1. La antaŭnomo de la japana virino en la novelo „Iluzioj" estas Nancy. 2. S-ro Honoré Pion estas juvelisto (en la novelo „Paf"). 3. Jean Gabin inspiris la novelon „Urno".

Libropremion gajnis: Waclaw *Nastaj,* Swidnik, PL; Eduard V. *Tvarožek,* Trenčin, CS. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Leterkesto

Nia redakciano – verdire juneca kvankam 75-jara – *Szilárd Bálint* kune kun la tuta redakcio elkore dankas la multajn legantojn, kiuj sendis al nia revuo siajn gratulojn okaze de lia jubileo. La varmaj – ofte ankaŭ spritaj – gratuloj ree inspiras ligi pli striktajn fadenojn inter Hungara Vivo kaj nia vasta legantaro.

J.J. Zeelie, Port Elizabeth, Sudafrika Resp.: Vian gratulon „pro la interesa revuo de H.V." el tiu fora angulo de la mondo, ni samideane akceptas. Ĉar vi transprenis la redaktadon de BONA ESPERO, revuo de la Sudafrikaj esperantistoj (kaj jam publikigis apartan kajeron pri la 68a UK en Budapeŝto kun multe dą fotoj), ni aŭguras pluajn movadovekajn, plaĉajn numerojn de via revuo!

Andreo Grigorjev, Krasnojarsk, SU: Nia leganto studas ekonomion, kaj kun aparta intereso observas tiurilate Hungarion, ĝian ekonomian vivon. El tio sekvas, ke lin nur apenaŭ kontentigas niaj glosoj en „Panoramo" kiuj havas rilaton kun tiu ĉi flanko de la hungara realo. Fakte, ni ne malofte prezentas artikolojn, eĉ pli longajn pri tiu temo; intertempe vi povis legi en n-ro 1984/3 pri la ekonomia reformo. Ni atentigas vin, ke ankaŭ en la teknikaj artikoloj troviĝas ne malgravaj mencioj pri diversaj ekonomiaj kontaktoj internaciaj, ankaŭ pri ĝiaj strukturoj. Kvankam ni bone konscias pri la graveco kaj la interesiĝoj tiurilate en nia legantaro, plian amplekson en la revuo tiucele ni ne povas promesi. Hungaran korespondanton trovi en tiu fako por vi verŝajne estos pli facile realigebla afero. Varman saluton!

Bert Schumann, Dessau, GDR: Ni konsentas: „mi kredas *pri* la ideo" (p. 47.) estas la pli ĝusta esprimo. La alia kritikita frazo ricevis iom komplikan formon, tutcerte, tamen ĝi havas esence klaran direndon, ĝuste tion, kion vi komprenis. Pro ĉiuj rimarkoj ni sincere dankas!

Ernst Green, Greenford, Anglio: „H.V. restas elstaranta ekzemplo de unuaklasa E-gazeto! – plenplena de interesaj artikoloj, belaspekta, bonstila kaj ege bone presita! " – skribis nia *ĝis nun fidela aboninto.* Ni citis, ĉar, sincere dirite, pli kuriozan konsekvencon legi ni neniam havis la ŝancon. Kiam ni gratulas pro via preterpasita „75a kilometroŝtono" de via vivo, ni kun kontento registras, ke la 17 jarkolektojn de H.V. – bele binditajn de vi mem! – vi intencas daŭre utiligi kiel *agrablan* legomaterialon dum la venontaj (espereble multaj) jaroj. Por tiun legadon efektivigi – jen kio igas nin bedaŭri – vi foriĝas de niaj *venontaj* numeroj, alivorte: kvankam kun granda bedaŭro, sed vi ne abonos plu H.V. Ni klinas nian kapon antaŭ tiu forta volo, kaj deziras al vi bonan sanon kaj longan vivon!

Gisella Marchioni, Gallarate, I: Pri via interesa letero ni povas – nur – parte konsenti. Ne elitismo, sed teknikaj malfacilaĵoj malhelpas ĝenerale la gazetojn skribi la prononcon de fremdaj nomoj. Se oni „malbone" prononcos ilin, kredu, eĉ se temas pri nomo de Kalocsay (kaloĉai), tertremo ne okazos. Internacie uzebla fonetika sistemo por la laika publiko ne ekzistas, kiom ajn bedaŭrinda estas tiu fakto. Kaj la tajpiloj, kaj la kompostiloj havas mankojn pri la eventualaj „kromsignoj", kaj des pli mankas/os ilia kono ĉe la publiko, ĉar nesupereblaj estas la fonetikaj komplikaĵoj tra la mondo. La „porkomputistan folion" ni transdonis al la ĝusta loko, kie oni same ĝuis vian gajan-prudentan stilon. Dankon.

Korespondi deziras

Inĝ. *Kepič* Vladimir (31) kun instruistinoj de japana lingvo, precipe el Japanio. *Strij,* str. 40-let Oktabrja 24, SU-293.500. – Instruistino Kristina *Sado* (40) kun hungaroj pri vivo kaj turismo, kol. bk. *Skierniewice,* ul. Mszczonowska 31m55, PL-96-100. – S-ro Nils Alvar *Ekstén* (36) fraŭlo, skoltestro, kun fraŭlinoj, skoltinoj, pĉt, ankaŭ rec. vizitoj. *Landskrona* POB 4050, S-261-04. – Por tutlanda ekspozicio Skolta E-Ligo en Svedio petas ĉiajn E-aĵojn, i.a. E-kasetoj kun kantoj, junularaj aĵoj (ev. pagas afrankon, prezon) al la supra adreso de N.A. Ekstén kasisto. – *Kelnik* Arno (35) juristo, pri filatelio, filozofio, turismo; *Kelnik Anne* (32) oficistino, pri literaturo, naturo, turismo, ambaŭ Estonio SU-203031 *Jüri,* Ehituse 4-6. – S-ro *Horváth* Imre (24) aŭtolavisto kun komunistoj-gesamideanoj, pri sociaj sciencoj, literaturo, folkloro. *Cakóháza,* Fő u. 36. H-9165. – Kristine *Luite* amatora pentristino pri artoj, desegnaĵoj, skribarto, ikebano, ankaŭ pri ĉiaj folkloraj artaĵoj, *Kiisa,* Piiri 5, Estonio SU-203410. – S-ro Jürgen *Kalweit* (25) ktm pri libroj, muziko, diskoj. *Zwickau,* Reichenbacher Str. 72. DDR-9540. – S-ino Maria *Jagello-Dangow* (56) – same 18-j. filino mezlernejanino – ktm, pĉt. *Gliwice,* Styczinskiego 37m6, PL-44-100. – *Gudilin* Sergej (30) laboristo, ktm, pri moderna junulara muziko, kol. suvenirojn, ludkartojn, mod-revuojn k.c. *Bratsk* str. Ĵeleznodorojnaja 19-8. SU-665707. – F-ino *Gineitytė* Aldona (17) interŝ. poŝkalendaretojn. *Mažeikiai,* Tirkŝlis gatvė 10. Litovio SU-235.500. – Pri radiotekniko, E-radioelsendoj, lingvo, literaturo, kun soc. landoj: *Gruianu* Petre (28), *Buzau,* Bdul Unirii B.24/B ap. 24. R-5100. – F-ino Grazyna *Mirkiewicz* (24) kemiistino pri E-movado, turismo, fotado, k.a. *Wroclaw* ul. Kubska 119/34.

Esperanto-Klubo, *Kotla* PL-67-240, anoj 15-40 j. dez. kontakti ktm, precipe pri muziko, foto, lumbildoj, turismo kc. Resp. certa. – Esperanto-Klubo Flamo ktm, pĉt. *Aluksne,* Kultura domo, Latvio SU-118.730. – *Vetter* János (20) studento pri maŝininĝ. *P. Ruskov,* Kossuth u.1. CS-935.62. – Geedzoj *Brális* Vita kaj Guntars kun same junaj geedzoj. *Lielvárde,* Konjaunatnes str. 29. Latvio SU-228.321. –

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Arta redaktoro: **Oszkár Böhm.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas ĉe ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78.- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest P.O.B. 149, H-1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest.
Indexszám: 25 377 ISSN 0018-7704

hearota-84-0081

METALLOGLOBUS

KOMERCA ENTREPRENO DE METALVAROJ
KAJ PRODUKTILOJ

FAKVENDEJO DE METALO KAJ PLASTO

BUDAPEST XIII. POZSONYI ÚT 25.
TELEFONO: 127-688
123-071

A METALLOGLOBUS

ATENDAS LA INTERESIĜANTOJN KAJ
PRIVATAJN AĈETANTOJN KUN PLENA
VARSORTIMENTO

Kárpátok

Telemanipulebla nigre-blanka televidaparato, aperanta unuafoje en la Hungarlandaj vendejoj.

TELEMANIPULEBLA NIGRE-BLANKA TELEVIDAPARATO, APERANTA UNUAFOJE EN LA HUNGARLANDAJ VENDEJOJ.

- Moderna ekstera formo: en koloroj nigra, kverko-kolora, jugłandkolora kaj antracitkolora
- Ok stacioj programeblas per infraruĝa telemanipulado
- Energiošpara elektrokonsumado
- Konektebloj por kapaŭdiloj kaj magnetofono

AT 4061